MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

4
1982
13,– Ft

HUNGAROCOOP
H–1370 Budapest 5.
P.O.B. 334
HUNGAROCOOP Kooperativa Entrepreno
por Ekstera komerco

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H–1368
Aperas dumonate
XXIIa jaro, 1982 n-ro 4
(104)

ENHAVO

László, I.: Regionoj de Hungario – Departemento Nógrád 122
Szabó, I.: „Nin firmigas espero..." 124
Ekonomia kalejdoskopo 127
Lányi, Gy. d-ro: Ni prezentas „Búvár", la revuon de la medio- kaj naturprotektado 128
Tóth-Máthé, M.: Vespermanĝo en la restoracio „Kvar fiŝistoj" 130
Szabó, I.: Balbuta psalmo 131
Carneiro da Silva, E.: Memadorado 131
Long, K.: Paŭlo kaj Breĥt: „Ne fermu la buŝon al bovo draŝanta" 131
Francis, J.I.: Estingo 131
Varga, J.: La vorto 131
Miroslav Krleža pri Endre Ady (R. *Škalamera*) 133
Rátkai, Á.: Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado 4. 134
Csiszár, E.: Perspektivo de Esperanto antaŭ la Ido-skismo 136
Marinko Ĝivoje (1919–1982), (P. A. *Rados*) 137
Golden, B.: La unuaj korespondantoj en Esperantujo 138
Rákos, S.: Ludoj de Catullus (I. *Szabó*) 139
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 140
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 143
László, F. d-ro: Kiel renaskiĝas la Lago Velencei? 144
Moldova, Gy.: Arrivederci, Budapest! (B. *Wacha*) 151
Mihalkov, G.: La naturo en la Esperanta poezio 153
Hungara Vivo en FRG 154
Recenzoj de E. *Fenyvesi* 155
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 157
Deák, M.: Vizito al GDR 158
Leterkesto 158
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 159
Korespondi deziras 160

Sur la frontpaĝo: Lignotura preĝejo en Hollókő (Foto de Z. *Fejér*)

Esperantologiaj temoj...

abundas en tiu ĉi numero: kompreneble daŭras la serio «Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado», en kies aktuala ĉapitro oni trovas interesan komparan statistikon pri Esperantaj kaj Volapukaj revuoj, respektive societoj. Ernő *Csiszár* analizas la perspektivojn de Esperanto antaŭ la Ido-skismo, kaj tiras konkludojn, kiuj estas atentindaj ankaŭ por la nuntempa informado pri Esperanto. Bernard *Golden* elektis kiel temon la historion de grava aspekto de la movada kulturo: la korespondadon. La eseo de Georgi *Mihalkov* turnas sin al la Esperanta literaturo: li ekzamenas la rolon de la naturo en nia originala poezio.

Kompreneble, aperas ankaŭ originalaj poeziaĵoj, tradukitaj poemoj, kaj tre sprita tradukita novelo de György *Moldova*, ĉerpita el la venontjare aperonta «Hungara Antologio», kiu estos inda libroeventa akompanaĵo de la 68-a Universala Kongreso en Budapeŝto. Cetere «libroeventoj» en Budapeŝto ne malabundas; ĵus aperis du tre valoraj originalaj novelaroj – *Lappar, la Antikristo* de Endre *Tóth*, kaj *La naŭa kanalo* de István *Nemere*.

Oni ĉerpu jam nun konsilojn por elekto de ekskursaj celoj dum la venontjara UK el la ĉi-numera ero de la parado de hungaraj regionoj: departemento Nógrád estas vere tre specifa kaj unika ekskursa celo. Post unu jaro denove kalejdoskopas en HV la hungara ekonomio, kun informoj kiuj estas interesaj ne nur por ekonomikistoj, sed por ĉiuj kiuj vivas en la kadro de ekonomio...

Ampleksa artikolo prezentas la agadon de Hungara Esperanto-Junularo, kiu dum la lastaj jaroj montris signifan aktivecon. Rekono de tiu agado estas subskribo de laborkontrakto kun Hungara Komunista Junulara Asocio, ja tiu prestiĝa junulara organizaĵo povos signife kontribui al la popularigo de Esperanto inter la hungara junularo.

Kroatio aperas eĉ dufoje en tiu ĉi numero, bedaŭrinde ambaŭfoje pro dolora kialo. Omaĝe al la memoro de Miroslav *Krleža*, profunda konanto kaj ŝatanto de la hungara kulturo, ni publikigas fragmentojn el liaj notoj pri la hungara poeto Endre *Ady*. Kaj aperas nekrologo pri alia kroato, Marinjo *Ĝivoje*, elstara konanto kaj aganto de la Esperanta kulturo kaj fidela membro de nia movado, okaza kunlaboranto de nia revuo.

Post la kaprica aperritmo de la lastaj numeroj tiu ĉi numero espereble atingos vin (en Eŭropo) ĝis la mezo de **septembro**. Notu, ke tio signifas jam nur dusemajnan malfruon...



Departemento Nógrád

En nia serio pri hungaraj regionoj nun venas la vico de unu el la plej interesaj: ni deziras prezenti la departementon *Nógrád.* Ĝi apartenas al la plej variaj, plej interesaj departementoj de Hungario, el ĉiu vidpunkto. Tio veras ne nur pri la geografiaj cirkonstancoj de la teritorio, sed ankaŭ pri la konsisto de la loĝantaro kaj ĝia kulturo. La departemento estas riĉa je historiaj memoraĵoj kaj pluraj elstaraj hungaraj verkistoj estas naskitaj en tiu ĉi regiono, interalie la plej granda hungara poeto de la 16-a jarcento Bálint Balassi, Imre Madách, la aŭtoro de *La tragedio de l' homo,* kaj la granda hungara prozisto de la 19-a jarcento Kálmán Mikszáth.

Kálmán Mikszáth estis tre fiera pri sia naskregiono. En 1910 la lando solenis lian kvardekjaran jubileon verkistan. Li estis grave malsana kaj nur malfacile eltenis la penadojn truditajn de la solenado. Sidante li akceptis la diversajn delegaciojn. Sed kiam la delegitaro de la departemento Nógrád sekvis por saluti lin, Mikszáth ekstaris. Vane petis lin la aranĝantoj por eksidi. Li respondis: „Ne, ne, la saluton de la departemento Nógrád mi akceptas starante."

Laŭ teritorio la departemento apartenas al la malpli grandaj, tamen ĝia signifo kaj beleco estas elstaraj. La nomon ĝi ricevis de mezepoka fortikaĵo, loĝita tiutempe de la turka bejo. Intertempe la fortikaĵo ruiniĝis, ĝi estas hodiaŭ nur historia restaĵo, sed ĉirkaŭ la ruinoj kaj en la tuta departemento pulsas vigla, ĝoja kaj diligenta vivo, pasinto kunfandiĝas kun nuntempo en la urbetoj, en la profundo de la minejoj kaj en vilaĝetoj, paradantaj per rozĝardenoj.

La loĝantaro de la departemento estas miksita. La plimulton sendube formas la t.n. „palóc"-oj, kiuj estas hungaroj, kun tre karakterizaj dialekto kaj kutimaro, krome troviĝas inter ili ankaŭ slovakoj, ja la norda limo de la departemento kontaktiĝas kun Slovakio.

Ruinoj de la fortikaĵo en Nógrád (Foto de Z. Fejér)

Pri la deveno de la „palóc"-oj cirkulas pluraj teorioj. Verŝajne la komencoj de tiu popolgrupo montriĝis jam dum la tempo de la patrujokupo (deka jarcento), poste ili miksiĝis kun ceteraj praaj popoloj. La nomo „palóc" devenas el la pola vorto „polovec" kaj origine oni uzis ĝin, kiel moknomon de tiu speciala popoltavolo. Poste la moka karaktero de la nomo malaperis, eĉ ĝi fariĝis ĉiam pli kuriozaĵo de la regiono kaj kiam Kálmán Mikszáth verkis novel-volumon pri *La bonaj „palóc"-oj,* per tio li levis je literatura rango la fermitan vivon de tiu popolgrupo. La palóc-oj estas homoj tradicio-gardantaj, la malnovaj popolkutimoj, koloraj vestaĵoj kaj arkitekturaj interesaĵoj de ilia regiono ankaŭ nuntempe allogas multajn en- kaj eksterlandajn turistojn.

La ĉefurbo de la departemento estas la 45 000 loĝantojn havanta *Salgótarján.* Ĝi estas evoluanta industria urbo, kies uzinoj kaj minejoj donas laboreblon ne nur por la loĝantaro de la urbo mem, sed ankaŭ por tiu de pluraj ĉirkaŭaj vilaĝoj.

La historio de la urbo komenciĝis jam dum la tempo de la patrujokupo, tamen ĝi kunfandiĝis speciale kun la centjara historio de la karbminado ĉirkaŭ la urbo. La produktaĵoj de ĝia ŝtal- kaj vitrouzinoj atingas ankaŭ landojn de foraj kontinentoj. Dum la pasinta jardeko oni modernigis la urbocentron de Salgótarján kaj de tiam imponaj konstruaĵoj donas grandurban karakteron al ĝi.

La ĉirkaŭaĵo de Salgótarján estas riĉa je pitoreskaj ekskursejoj. La arbarkovritaj, vulkandevenaj montopintoj, inter ili la valoj taŭgas por promenadoj, kaj por sportecaj montgrimpadoj. En la proksimo de la urbo troveblas la fortikaĵo *Salgó,* kiu konstru-

Popolkostumo en Buják (Foto de Z. Fejér)

Fasado de la kastelo en Szécsény (Foto de Z. Fejér)

iĝis en la dektria jarcento kaj ĝis nun estas unu el la plej interesaj vidindaĵoj de la ĉirkaŭaĵo. La ruinoj de la fortikaĵo Salgó estas ŝatata ekskursejo de turistoj, tiom pli, ĉar en la proksimo funkcias ankaŭ moderna hotelo kaj restoracio.

Balassagyarmat situanta ĉe la bordo de la rivereto Ipoly, ĝis 1950 estis ĉefurbo de la departemento. La urbeto – proksime al la hungara-ĉeĥoslovaka landlimo – havas ĉ. 20 000 enloĝantojn. Ĝia historio komenciĝis en la dekkvara jarcento kaj la nomon ĝi ricevis de la iama familio Balassa, kiu la ĉirkaŭaĵon tiutempe posedis. Dum la kontraŭturkaj militoj (16-a kaj 17-a jarcentoj) la urbeto fariĝis la norda limo de la fremda konkero. La turkoj plurfoje ruinigis la konstruaĵojn kaj la restaŭro okazis nur dum la komenco de la deknaŭa jarcento. En la iama departementa domo laboradis longe Imre Madách kaj Kálmán Mikszáth.

Balassagyarmat, kiel menciite, estas eta urbo, tamen el kultura vidpunkto ĝi konservas konsiderindajn memoraĵojn. La t.n. Palóc-Muzeo, fondita antaŭ 90 jaroj, sendube estas unu el la plej riĉaj muzeoj provincaj de Hungario. Ambaŭ famaj naskitoj de la departemento (Madách kaj Mikszáth) havas apartajn memorĉambrojn en ĝi. Malantaŭ la muzeo troveblas la „Palóckorto", kiu estas konata etnografia muzeo-apartenaĵo de Hungario.

Szécsény, havanta 6000 loĝantojn, estas frekventata elirpunkto de turistoj al la nordaj regionoj de la monto Cserhát. Ĝia fortikaĵo, konstruita en la mezepoko, havis rolon ankaŭ dum la kontraŭturkaj bataloj kaj poste en la liberbataloj kontraŭ la aŭstra Habsburg-regado.

Pásztó havas 8000 loĝantojn. Ĝia cisterciana abatejo estis fondita dum la dekdua jarcento. La gotikstila preĝejo estas unu el la plej gravaj arkitekturaj valoraĵoj de la departemento.

Érsekvadkert estas mezgranda vilaĝo. kiu menciindas pro tio, ke en ĝi la loĝantaro ĝis nun portas specialan popolan kostumon. La kantoj kaj dancoj de ĝia ĉirkaŭaĵo ankaŭ nun estas ŝatataj programeroj de popolaj ensembloj.

La ruinoj de la fortikaĵo (nuntempe bela elvidejo), norde de la vilaĝo *Drégelypalánk* ankaŭ memorigas nin pri la gravaj bataloj kontraŭ la turkaj konkerintoj. La sieĝo de la fortikaĵo (en la deksesa jarcento) finiĝis per la venko de la turkoj. La ruinigitan fortikaĵon oni neniam plu rekonstruis.

Hollókő estas eble la plej pitoreska vilaĝo de Norda Hungario, kaj unika ankaŭ pro la ravaj popolkostumoj, interesaj kutimoj kaj tre karakteriza popola arkitekturo. Ĝia lignotura preĝejo estis konstruita dum la 14-a jarcento. (Vd. sur la kovrilpaĝo.)

En ĉi tiu departemento Esperanto ne havas tre profundajn radikojn. Nuntempe funkcias grupoj en Balassagyarmat, Pásztó kaj du grupoj en Salgótarján, sume kun 90 gemembroj.

István *László*

»Nin firmigas espero...«

Esperanto kaj la hungara junularo

La sepan de aprilo 1982 okazis solena subskribo de kontakto pri kunlaboro inter la Prezidio de Centra Komitato de la Hungara Komunisma Junulara Asocio (KJA) kaj la Estraro de la Hungara Esperanto-Asocio (HEA). Pri la evento informis ankaŭ la novaĵagentejoj kaj nacilingvaj revuoj. La dokumento estas grava rekono de la ĝisnunaj rezultoj plenumitaj de Hungara Esperanto-Junularo kaj samtempe ĝi certigas ĝis nun neniam ajn spertitajn, avantaĝajn kadrojn por la pli bona kaj efika kunlaboro.

Informado, informado...

La movadan laboron sur ĉiuj terenoj anticipas la informa, propaganda agado, tiel estas ankaŭ kaze de la junularo. Pri kio informi la gejunulojn? Pri la lingvo kiel rimedo por atingi celojn gravajn el la vidpunkto de la individuo. La alia objekto de la informado estas mem la movado funkcianta. Sed pri la movado ni ne rajtas informi kiel pri iaspeca celo, ĉar la movado ne estas celo, nur rimedo. Rimedo certiganta la eblojn de memefektivigo por la homo, kaj samtempe ĝi estas modelo de la sendiskriminacia lingvouzo, kaj kiel tia, ĝi povas altiri la atenton de la socio luktanta kontraŭ la diverslingveco. El la ĵus diritaj rezultas la du branĉoj de la primovada informado. La unua devas malkaŝi la eblojn por la unuopa homo, emfazante, ke interkomunikiĝo senantaŭjuĝa kaj internaciskala jam ekzistas, sed nure nur kadre de la movado. La alia direkto estas la informado pri la movado kiel pri historie necesa socia fenomeno dezirinda kaj ekzistanta.

Dum la lastaj jaroj la ĉi-supraj pensoj difinis nian interjunularan propagandon. La monata revuo *Ifjúsági Magazin* (Junulara Magazino) pasintjare ĉiunumere publikis Esperanto-lecionojn. La revuo aperas en kvaronmiliono da ekzempleroj. La mezurebla rezulto estas: ĉirkaŭ mil gejunuloj alsendis regule siajn lingvajn solvojn. Sed ne estas primezurebla la kleriga efiko, kiu montros siajn fruktojn nur poste.

Estas tre ĝojige, ke ankaŭ hungaraj amatoraj trupoj ekinteresiĝis pri Esperanto. Ensemblo Gorgo prezentas satiraĵon de Pietro Bambi en Nyiregyháza. Foto de Zsolt Csala

La primovadan informadon reprezentis duspecaj artikoloj: intervjuoj kun opaj personoj pri iliaj spertoj rilate la lingvouzon (ĉi tie ni menciu ankaŭ la anoncetojn pri koresponddeziroj en la naciaj gazetoj), la alia parto de la materialoj sciigas pri la funkciado de la movado, ĉefe pri ĝiaj eventoj, sed sporade aperadis jam ankaŭ fakaj studaĵoj, kiuj parolas ne pri ebloj, sed prezentas realigitajn faktojn. Bedaŭrinde pri la kuntenaj ideaj fortoj de la movado preskaŭ tute ne aperis artikoloj kaj la trarigardaj, resumaj ideologiaj studoj

Unu el la plej ŝatataj programeroj de JER estas ĉiam la kulturaj programoj. Aŭstra danc-ensemblo en Tata

tute mankas.

Analizante la propagandajn rimedojn, ni povas konstati, ke la plej solida bazo estas la nacilingva gazetaro, kiu ĉiam volonte staras je nia dispono, kondiĉe, ke niaj artikoloj estas sufiĉe altnivelaj kaj interesaj ankaŭ por la neesperantistoj.

Dum la pasintaj jaroj aperis en plurcent mil ekzempleroj ankaŭ flugfolioj, kiuj estis disdonitaj dum grandaj amasfestoj (kiel la unuamaja festo, festo de la libro, k.a.), kie la homoj estas pli apertaj al la interesaĵoj ol kutime. La disdonado de flugfolioj okazas ĉe Esperanto-stando, kie la interesiĝantoj povas aĉeti tuj ankaŭ lernolibrojn kaj revuojn, povas trafoliumi esperantlingvajn eldonaĵojn kaj la plej kuraĝaj partoprenas kvinminutan ekspres-instruadon. Ankaŭ ekspozicioj okazadis, sed bedaŭrinde ankoraŭ tre rare. Same tre maloftaj estas la propagandaj prelegoj kaj la kompleksaj propagandcelaj kulturaj programoj. La muziko momente same ne estas ekspluatata (kvankam nia fama kantistino Zsuzsa Koncz foje kantis Esperante en la radio). Grandaj ebloj kaŝas sin ankoraŭ en la amatoraj aktoraj trupoj kaj muzikensembloj. Mankas informkajeretoj pri la movado, kiuj povus servi kiel bazo ĉe la prepariĝoj por prelegoj.

Lerni kaj paroli

Ĉi tie ni menciu unuavice la lingvoinstruadon, kiu havas la sekvajn formojn: kadre de instruaj institucioj (baz-, mez-, altlernejoj kaj universitatoj), klerigaj centroj (kulturdomoj, Sciencpopulariga Societo), movadaj kursoj (tradiciaj, intensaj, korespondaj) kaj privata lernado. La lingvoalproprigo je nivelo de parolkapablo estas ĝenerale certigita, ankaŭ kelkaj fakaj direktoj (instruado, turismo ktp), estas prilaboritaj, sed krom la disponigo de literaturo, nenio alia estas farita por la amasa elformado de la pli altnivela lingvoscio kaj -uzo.

La taskoj antaŭ la junularo amasiĝas paralele kun la ĉiunivela vastiĝo de la ebloj. Sekve la movada kapabligo, primovada instruado estas nepreterirebla postulo. Kvankam jam regule organiziĝas kapabligaj kursoj por la volontuloj kaj aktivuloj, la stato nuntempe ne estas konvena. Devas ekesti laborgrupo okupiĝanta pri la kolekto kaj analizado de la necesaj konoj.

Movadaj aperformoj – renkontoj

Elstaraj pintoj de la movada jaro estas la renkontoj kaj aliaj eventoj,



Antaŭ la nove donacita flago de JER d-ro Imre Pethes prezentas sian parolon al la partoprenantoj de la packunveno dum JER en Nyiregyháza. Foto de Zsolt Csala

kiuj, krom la certigo kaj demonstrado de dum kelkaj tagoj funkcianta modelo, havas ankaŭ aliajn specialajn trajtojn. Nepre la plej grava kaj plej amasa aranĝo de Hungara Esperanto-Junularo estas JER (Junulara Esperanto-Renkonto), kiun krom la kelkcent hungaroj partoprenas gejunuloj ankaŭ el la proksimaj landoj. Ĝia ĉefa celo estas certigi kompletan interŝanĝon de spertoj sur la opaj kampoj, trarigardi la plenumitan vojon kaj difini la taskojn. Kadre de la tradicie semajnfina aranĝo funkcias laborgrupoj, inter kies temoj ni trovas sciencojn, metiojn, artojn kaj ŝatokupojn. Ĉiam havas elstaran lokon la pacaranĝo: ĉu manifestacio, ĉu amaskunveno. Tutvesperan programon certigas jam ekde jaroj la teatraj kaj artaj prezentadoj. Ankaŭ ĉi-jare, same kiel dum la antaŭaj, la sociaj instancoj de la gastigantaj departemento Szabolcs-Szatmár kaj urbo Nyiregyháza disponigis al la organizantoj tre valoran helpon. Sed la ĉijaran Renkonton karakterizis ankaŭ aliaj novaj trajtoj, parte eksperimentaj. Nun la tuta evento daŭris tutan semajnon, tiel ke ĉirkaŭ cent personoj partoprenis intensan kurson gviditan de la lernolibro-verkinto Jozefo Horváth, la ceteraj cent kvindek gejunuloj havis apartan programon: danc- kaj kulturvesperojn, ekskursojn ktp. Por la semajnfino alvenis tiuj, kiuj ne havis por la tuta semajno liberan tempon aŭ sufiĉan monon. Dum tiuj du kaj duona tagoj kulminis la programoj. La finan etapon ĉeestis preskaŭ kvincent homoj. En 1983 en urbo Kaposvár ni planas aranĝi JER denove en la antaŭa simpla semajnfina formo, ĉefe pro la Internacia Junulara Kongreso, kies preparlaboroj tute absorbos la fortojn.

Laŭ la kronologio la sekva estas la Mezlerneja Ripoztendaro partoprenita pasintjare de kvarcent kvindek gejunuloj. Ĝi estas dediĉita ĉefe al tiuj 14-18-jaruloj, kiuj ĵus ekinteresiĝis pri la lingvo kaj movado. Ili partoprenas tutsemajnan lingvokurson de ĉiuj gradoj kaj ĉe la fino ekzameniĝas.

Antaŭ kelkaj jaroj startis en Hungario la internaciaj laborbrigadoj. La iniciato devenas el la urbo Túrkeve, kie okazis la unuaj tiaj aranĝoj. Tion sekvis la etapo de la centraj brigadoj organizitaj kune kun la Centra Komitato de KJA. Ankaŭ en 1982 okazos ses laborbrigadoj: kvar brigadoj en la vilaĝo Harta (ĉe Danubo) akvumos maizejojn, unu en la urbo Szentendre faros medioprotektan laboron, la sesa estos speciala: ĝin organizas la KJA-Komitato de departemento Vas

La flegado de sunfloroj estas iom malpli komplika ol la akvumado. Foto de L. Szilvási

kune kun la Pedagogia Altlernejo en Szombathely por tiuj mezlernejanoj, kiuj post la seshora laboro intencas konatiĝi kun Esperanto. Sed la iniciatoj estas sekvitaj ankaŭ de aliaj, la KJA-Komitato de Sciencuniversitato „Eötvös Loránd" eksperimente organizas brigadon laŭ la modelo de Szombathely, la Teknika Altlernejo de Maŝinindustrio kaj Aŭtomatigado en Kecskemét volonte akceptos ankaŭ eksterlandajn esperantistojn en sia brigado en Baja. Ĉio ĉi koncernas ĉirkaŭ kvarcent homojn. La partoprenantoj de la laborbrigadoj organizitaj de HEJ partoprenos ankaŭ ferian etapon.

HEJ fortigis sian atenton ankaŭ rilate la opajn tavolojn kaj interesojn de la junularo. Por la altlernejanoj, universitatanoj kaj junaj fakuloj servas la Scienca Aŭtuna Forumo (SAF), kie krom la aktualaj organizaj temoj estas aŭskultataj ankaŭ altnivelaj sciencaj prelegoj.

Dum la Vintra Esperantista Ferio (VEF) organizita de la Budapeŝta Komitato de HEA ĉiam okazas ia faka simpozio; pasintjare kunsidis la ekonomikistoj, ĉi-jare kunvenos „Interkomputo". La ĉi-lastaj estas komune aranĝataj ne nur de HEJ kaj la Komisiono de Faka kaj Scienca Aplikado, sed ankaŭ de la koncernaj naciaj fakaj asocioj.

Ni tragalopis la movadan jaron kaj povis sperti, ke multaj eventoj ekzistas – eĉ sen mencii la departementajn –, la junularo agadas. Ni menciis kelkfoje ankaŭ tiajn fenomenojn, kiuj koncernas la tutan movadon, sed ili ne estas disigeblaj disde la temo junulara. Kiuj estas la ĉefaj taskoj de la futuro? Antaŭ ĉio gardi, evoluigi la atingitajn rezultojn, kaj labori por konkeri la sekvan ŝtupon, kiu estas altigo de la kvalito kaj laŭ la organiza strukturo, kaj laŭ la enhavo de la laboro. Por ĉio ĉi certigas tre avantaĝajn kadrojn la kontrakto kun KJA.

La kontrakto

La enkonduka parto aludas pri la elformiĝo de tradicia, bona kunlaboro inter la kontraktantaj partioj kaj substrekas, ke „la pli fruktodona plenumo de la celoj de ambaŭ movadoj same pretendas, ke inter iliaj organizaĵoj ĉiunivele plifortiĝu la kunagado kaj establiĝu pli senpera laborkontrakto". Fiksante la celojn la dokumento emfazas la neceson de „lukto por daŭra paco, interpopola amikeco kaj paca kunekzistado", de „formado kaj evoluigo de la pensmaniero de homo agema por la homara progreso kaj socia evoluo", de la „altigo de la kultura nivelo de la membroj" kaj de „diskonigo de sociaj, ekonomiaj kaj kulturaj rezultoj de la socialisma Hungario".

La tria parto enhavas la formojn de la kunlaboro. La ĉapitron plene karakterizas simetrio kaj samrangeco de la flankoj, do eble sufiĉas mencii la opajn agadkampojn. KJA „en la junulara gazetaro kaj per aliaj propagandaj rimedoj popularigas la lingvon Esperanto, prezentas kaj subtenas Esperanto-movadon". Subtenas la organizadon de internaciaj kaj enlandaj laborbrigadoj, pioniraj kaj lingvaj tendaroj, Esperanto-ripoztendaroj, hobicelaj aktivaj ripozoj, ekskursoj. Helpas per siaj rimedoj la laboron de la sciencaj studentrondoj en la altlernejoj kaj universitatoj. KJA organizas por siaj membroj kaj por la pioniroj Esperanto-kursojn kaj konkursojn. Subtenas la strebadojn de HEA sur ĉiuj forumoj, kaj tenas kun ĝi laborkontakton ĉiunivele.

Tiu ĉi kontrakto malfermas vastajn eblojn por HEJ, kaj estas verŝajne, ke ni ne tuj povos eluzi ĉiujn. Unu afero tamen estas certa: ni faris gravan paŝon por envicigi Esperanton inter la ordinarajn kulturajn agadkampojn de la hungara junularo.

Imre *Szabó*

La laborbrigadanoj ankaŭ dum la laboretapo partoprenis kulturajn programojn. Foto de L. Szilvási

Ekonomia kalejdoskopo

Dum tiu ĉi jaro Hungario aliĝis al IMF (Internacia Mona Fondaĵo). Nia lando estas la 146-a ŝtato-membro de tiu ĉi prestiĝa organizaĵo, kiu disponigas al siaj membroj pruntojn kun favora interezo.

*

Multajn financajn rimedojn de Hungario englutas la superfluaj provizoj. Ordinare la valoro de ĉiuj provizoj egalas la jaran nacian enspezon. 12% de ĉiuj provizoj estas pretaj varoj ankoraŭ nevenditaj, 16% varoj duonpretaj, kaj 72% estas bazaj materialoj kaj pecoj aĉetitaj. *Pro la manko de ĉiam certa liverado la hungara industrio havas provizon sufiĉan por averaĝe 80-taga produktado. La industrio en evoluintaj kapitalismaj landoj havas normale materialojn por 6-10-taga produktado. Tamen, tiu „akumulemo" de la hungaraj entreprenoj likvideblos nur per ĉiama certa disponeblo de la bazaj materialoj, necesaj por ili.*

*

La kreskado de alkoholkonsumado ĉiam pli zorgigas hungarajn sociologojn. Hungario staras sur la sepa loko de la konsumada listo kun 12-litra konsumado por persono (kalkulante en absoluta alkoholo). Pli grandan konsumadon oni trovas en Francio (15,4 l), Hispanio (14,1 l), Luksemburgo (13,9 l), Portugalio (12,7 l), FRG (12,7 l), Italio (11,5 l). En almenaŭ kvar el tiuj ses landoj la plej populara alkoholaĵo estas vino, dum hungaroj englutas siajn 12 litrojn ĉefe en formo de densaj alkoholaĵoj, kaj estas konate, ke ĝuste la ĉi-lastaj pleje ruinigas la sanon. Ekonomiistoj siavice demonstris, ke Hungario havas la unuan lokon en tiu listo, kiu montras, kiom da procentoj de siaj enspezoj oni elspezas por alkoholaĵoj? Hungaroj aĉetas alkoholajn trinkaĵojn por 11% de siaj enspezoj. Jen kelkaj aliaj landoj por komparo: Pollando (10%), Sovetio (8%), Portugalio (7%), Francio (1,5%), Hispanio (1%). Tiuj indikoj montras, ke la altigo de prezoj ne nepre kondukas al la reduktiĝo de la konsumado, kaj inverse, malaltaj prezoj ne nepre stimulas la trinkemon...

*

La nacia enspezo kaj la industria produktado dum la jaro 1980 malkreskis – la unuan fojon dum la lastaj tri jardekoj. En 1981 la nacia enspezo modeste kreskis je 1,8% (oni planis 2,5 procentojn). Dum la pasinta jaro Hungario sukcesis fine plene kovri sian importon per eksporto, eĉ atingi simbolan pozitivan saldon (de 40 milionoj da dolaroj). La plano por 1982 mencias du centrajn taskojn: la plibonigon de la bilanco de la ekstera komerco, kaj konservadon de la vivnivelo atingita en 1980. Dum la nuna jaro la plibonigo de la bilanco verŝajne iom devos suferi, ĉar pro la malfavora ekstera ekonomia „klimato" alie ne eblos konservi la atingitan vivnivelon de la loĝantaro.

*

Turismo fariĝas ĉiam pli grava faktoro en la hungara ekonomio, kvankam ĝiaj enspezoj kompreneble signife postrestas al tiuj de la produktantaj ekonomiaj branĉoj. Dum la pasinta jaro Hungarion vizitis 14,8 milionoj da eksterlandanoj (12,5 milionoj el socialismaj landoj, 2,3 milionoj el kapitalismaj landoj), ili pasigis en nia lando 73,6 milionojn da noktoj. La turismaj enspezoj estas ĉ. 14 miliardoj (mil milionoj) da forintoj; ĉ. 45% de tiu sumo en okcidentaj valutoj. Dum la unuaj tri monatoj de 1982 la turisma fluo el socialismaj landoj grave ŝrumpis, ĉ. trioniĝis. Polaj turistoj ne alvenis, la nombro de ĉeĥoslovakianoj kvinoniĝis. Dum la sama periodo la nombro de turistoj el kapitalismaj landoj kreskis je 14%.

*

La hungara ekonomia gazetaro lastatempe multe okupiĝas pri la proporcioj inter la salajroj de intelektuloj kaj faklaboristoj. Laŭ la statistikoj la diferenco inter iliaj salajroj malkreskas, kaj tio malfavore influas la laboron de intelektuloj. En 1972 faklaboristo gajnis meze 77% de la meza intelektula salajro, 83% en 1977, kaj 86% en 1979. Tiu relativa malkreskado de intelektulaj salajroj estas procezo nepre haltigenda. La salajropolitiko de la nuna jarkvino donas apartan atenton al la kreo de ĝustaj proporcioj inter la faklaboristaj kaj intelektulaj salajroj.

*

Hungario situas meze de Eŭropo, inter socialismaj kaj evoluintaj kapitalismaj landoj, iom for de la evolulandoj. Verŝajne tio kaŭzas, ke la proporcio de la komerco kun evolulandoj en la hungara ekstera komerco ne atingas eĉ 10 procentojn. (Menciindas, ke antaŭ la dua mondmilito tiuj landoj – plejparte kolonioj ankoraŭ – havis la saman proporcion en la hungara eksporto kaj importo.) La plej gravaj partneroj de Hungario estas laŭ vico de graveco: Irano, Irako, Turkio, Alĝerio, Kuvaito, Nigerio kaj Sirio. Industriaj varoj konsistigas 81 procentojn de la hungara eksporto, kaj 14,7 procentojn de la importo. Ampleksigo de la komerco inter Hungario kaj la evolulandoj, kaj strukturaj ŝanĝoj en la hungara importo estos unu el la celoj de la hungara ekstera komerco dum la sekvaj jaroj.

*

Laŭ atesto de la statistikoj la kreskoritmo de komerco inter la landoj de KEI (Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo) malrapidiĝas. Ekzemple, la hungara komerco kun KEI-landoj inter 1971-1975 kreskis je 68 procentoj, inter 1976-1980 je 38 procentoj, kaj dum la nuna jarkvino ĝis 1985 ĝi kreskos je nur 21 procentoj. Tiu fenomeno fontas el pluraj kaŭzoj; ĉefe el tio, ke ĉiuj KEI-landoj havas atentindajn ŝuldojn al okcidentaj landoj, kaj dum la nuna jarkvino ili deziras reakiri, respektive firmigi sian financan ekvilibron. Tiu celo necesigas, ke oni kreskigu sian eksporton ĉefe al okcidentaj landoj. Paralele kun tio necesas, ke la KEI-landoj restrukturigu sian ekonomion surbaze de teknologioj ŝpare utiligantaj materialojn kaj energion.

Ni prezentas: **BÚVÁR**

la revuon de la medio- kaj naturprotektado

Dum la 2-a Landa Konferenco de Búvár-kluboj la ĉefredaktoro faras sian enkondukan prelegon

Inter la du mondmilitoj komencis aperi en Hungarlando la populare scienca, ilustrita revuo **Búvár** (Esploranto), kies redaktado fare de elstaraj scienculoj (inter ili L. *Lóczy,* Raoul *Francé,* A. *Szent-györgyi,* Nobel-premiito, k.a. plejparte biologoj, geografoj, naturesplorantoj), baldaŭ igis ĝin ŝatata ĉe la publiko, deziranta informiĝi pri multaj aspektoj de la naturo. Oni kontentigis tiun deziron per altvaloraj artikoloj, ĉar kiel la inaŭgura artikolo deklaris: „la ESPLORANTO volas konduki la legantojn al tiu sfero, kie la naturon esplorantaj sciencistoj observas la sekretojn de la vivo, de la mondo. Kaj ĝia klopodo estos komuniki al vastaj homgrupoj la ekkonojn, akiritajn en silentaj laboratorioj, bruaj metiejoj, oceanaj profundoj, trankvilaj hospitaloj, do la rezultojn de la scienco. Kaj ilin ĝi volas tiamaniere komuniki, ke ili estu kompreneblaj ankaŭ al personoj, por kiuj la scienco ne estas profesio, nur interna bezono, eĉ distro."

La „Societo por Disvastigi Socian kaj Natursciencon" refreŝigis post la mondmilito la progresajn tradiciojn de la revuo **Búvár** kaj denove eldonis ĝin. De tiam la revuo iĝis samtempe bulteno de la biologia, sanitara kaj agrokultura fakoj de la Societo, kaj de 1972 ĝi aperis jam kiel „biologia kaj medioprotekta revuo de la Societo". La medioprotekto kompreneble jam delonge donis temojn por la artikolojn verkintaj scienculoj, sekve la revuo en la unua vico luktis dum la jardekoj por tiu gravega celo. Ankaŭ la publiko pli kaj pli interesiĝis favore al la medioprotekto, la artikoloj de la plej eminentaj scienculoj vekis foje grandajn eĥojn. Ankaŭ sekve de tiuj sukcesoj, en 1974 la revuon transprenis la plej kompetenta ŝtata instanco, la *Oficejo de Naturprotektado.* La 64-paĝa etformata revuo transformiĝis je grandformata, 48-paĝa belaspekta revuo, kun koloraj kovrilpaĝoj, aperanta jam ĉiumonate! De kelkaj jaroj „Esploranto" – **„Búvár"** plu moderniĝis laŭ aspekto, kun siaj 16 *koloraj* paĝoj; ja la revuo jam aktive partoprenas la movadon de la medioprotektado enkadre de la *Patriota Popolfronto.*

Tiu ĉi pli alta ŝtupo en la kariero de la revuo inaŭguris veran movadon ĉirkaŭ ĝi. La celoj de la revuo: helpe de la Popolfronto kreiĝis tra la lando multaj **Búvár-kluboj,** t.e. kluboj agantaj cele al la natur- kaj medio-protektado! Jen junuloj, lernantoj, jen plenaĝuloj, laboruloj, foje de iu entrepreno, partoprenas tre aktive en tiuj kluboj la loke gravan protektadon. Oni aŭskultas prelegojn, kaj konatiĝas kun aferoj de la aktualaj protekto-problemoj (ekzemple por maloftaj birdoj aŭ aliaj bestoj). La klubaj enketoj kaj diskutoj ne restas nur ĉe la parolo: la membraro klopodas mem fari en la ĉirkaŭaĵo la necesajn agojn por ŝirmi tie la vivulojn, eventuale la belaĵojn de la naturo, kaj tiel plu. Multaj scienculoj volonte vizitas tiujn klubojn kaj donas klarigojn pri siaj fakoj, pri siaj esploroj koncerne diversajn flankojn de la medio. Oni lernas trovi plezuron en la naturo, kaj kompreni ĝian gravecon por la homaro. La redakcio de **Búvár** per multaj manieroj orientas kaj instigas la agadon kaj plivastiĝon de tiuj **Búvár-kluboj.**

Komence la revuo publikigis – pere de artikoloj fare de la plej eminentaj scienculoj – jam stabilajn rezultojn kaj freŝajn esploritaĵojn de la *biologiaj sciencoj,* la plej gravajn laŭ eduka kaj informa vidpunktoj. Aperis multaj artikoloj – abunde kun bildoj kaj klarigaj skizoj – kies temoj rilatis al la evoluteorio, biokemio, radiobiologio, anatomio, fiziologio, mikrobiologio, genetiko kaj antropologio. Por pli praktike koni la *naturmedion,* la revuo publikigis multe ankaŭ pri ekologio kaj biologio de vegetaĵoj, hidrobiologio, agrobiologio, ne preterlasante la animalojn, ties sistemigon, biologion kaj vivmanierojn. Por flegi kaj klerigi la *pasiojn* de multaj naturamantoj, regule aperis artikoloj ankaŭ en la temaroj de akvaristiko kaj teraristiko, ĝardenkulturo apud kaj en la domo , fungologio, birdoŝirmado, hundobredado, birdobredado.

De la 60-aj jaroj la revuo okupiĝis – ankaŭ por helpi la instruistojn – pri *la plej novaj esploraj rezultoj,* perspektive gravaj, kiuj prezentiĝis ĉe la informa genetiko, enzim-esploroj, virusologio (malrapidaj virusoj, interferono kaj ĝia produktado, k.a.), kosmobiologio (kiu disvolviĝis kun la astronaŭtiko). Tie ĉi estu menciataj: la etologio, kiu malkovras la verajn motivojn de la bestaj kondutoj, la ekologio de la medio, esploranta la tutmonde aperantajn tensiojn en la medio, ties kaŭzojn kaj interrilatojn; kompreneble tiujn oni prezentis kune kun la Hungarlandaj naturriĉaĵoj (rezervejoj, maloftaj kunvivejoj de vegetaĵoj aŭ animaloj) kaj kun ilia protektado praktika.

El inter la eminentaj kunlaborantoj estu nur kelkaj mondfamaj nomoj menciataj: A.I. *Oparin,* Konrad *Lorenz,* János *Selye,* Albert *Szent-Györgyi,* Gy. *Ortutay.* Famaj profesoroj, estroj de *ekspedicioj* kondukis la legantojn de „Esploranto" al regionoj

malproksime de Mezeŭropo, kaj prezentis la tiean interesan medion. Profesoro Csaba *Anghy* raportis kun multaj bildoj pri stepoj de Mongolio, pri Siberiaj tundroj kaj tajgoj; akademiano János *Balogh* pri siaj grundzoologiaj ekspedicioj al Sud-Ameriko kaj Oceanio; kaj oni povus ankoraŭ longe listigi similajn raportojn pri Nord-Afrikaj dezertoj, glacimontoj de Antarktiko, Afrikaj sovaĝbestoj kaj aliaj. Aparte granda intereso akompanis dum pluraj jaroj (ĝis lia morto) la raportojn kun grandiozaj fotoj de la fama indianologo, d-ro Harald *Schultz*, pri Amazoniaj indianaj triboj loĝantaj en la praarbaro kaj pri liaj multspecaj esploradoj en tiu vasta kaj sovaĝa riverpejzaĝo. La redakcio ankaŭ publikigis sciencfikcian romanon, tra multaj numeroj daŭrigitan, kun titolo „La okulo de la Sundio", kiun speciale por la revuo verkis Sándor *Antal*.

Dum la 70-aj jaroj aperis pli kaj pli da *mediobiologiaj* artikoloj; i.a. pluraj universitataj profesoroj kaj akademianoj publikigis pri akvo-ekologio,



Búvár estas alloge bela revuo

ekologiaj reguligaj sistemoj, pri ŝarĝokapablo de medio-sistemoj, pri ties materiala kaj energia cirkulado. La prezidanto de la Landa Oficejo pri Naturprotekto, Zoltán *Rakonczay* detale informis la legantojn, kiel statas la naturprotektado en Hungario, krome ankaŭ pri la unua nacia parko: *Hortobágy* (hortobadj).

En la lastaj jaroj la redaktado pli kaj pli zorgis pri artikoloj koncernantaj ankaŭ aliajn sferojn de la *medioprotekto*, apud la naturprotekto: la plej kompetentaj fakuloj verkis kaj informis pri protektado de l' aero, akvoj kaj grundo kontraŭ polucioj, demetado de rubaĵoj en la ĉirkaŭaĵo, prevento de bruego, disvolvo de pejzaĝoj, k.s. La revuo demandas la koncernajn fakulojn kaj estrojn de ministerioj kaj instancoj, kiel statas la medioprotektado en ilia sfero. Dum „rondtabla" diskuto kaj ĉen-intervjuoj oni paroligas foje kune scienculojn kaj fakulojn de instancoj, pri kontraŭdiraj situacioj en la medioprotektado, pri ties solveblecoj, pri la plej urĝaj ŝtataj kaj sociaj farendaĵoj.

La ĵurnalistoj de **Búvár** vizitas ofte entreprenejojn, vilaĝojn, naturrezervejojn por raporti pri problemoj de la loka medioprotektado, ankaŭ pri la tie estiĝintaj rezultoj. Krom la propraj ĵurnalistoj la redakcio donas eblecon ankaŭ al eminentaj eksteraj ĵurnalistoj por prezenti siajn pensojn pri la medioprotekto (inter ili estas nia s-ano András *Sugár*, tre populara televid-raportisto). Vastan disputon, ankaŭ fare de legantoj, ebligas la rubriko „Forumo", kie kutime svarmas la ideoj kaj proponoj pri medioprotekto, ekzemple pri la tiucela eduko, la vera senco de la ekologia ekvilibro, la utiligo de la rubaĵoj, okaze ankaŭ pri la manieroj eviti la damaĝojn, komunajn al la abelbredado kaj agrokulturo.

Por partoprenigi la legantojn en la redaktado, antaŭ du jaroj estis enkondukita la rubriko: „Informoj de la raportistoj de **Búvár**". Tiuj amatoraj raportistoj, ĝenerale taŭgaj aktivuloj de la Búvár-kluboj, havas legitimilon de la redakcio, kaj kun elano ili serĉas publikindajn aferojn en siaj ĉirkaŭaĵoj, ĉu laŭdindajn, ĉu plendindajn.

El la supraj jam certe estas rimarkeble, ke la tre diverse interesiĝanta kaj orientiĝanta legantaro, aldone la kluboj kaj la eldonantaj organizaĵoj de la revuo, postulas ege diversajn temojn, kaj bezonas same tre diferencajn stilojn kaj nivelojn. Kiam la redaktoroj faras ĉiujn siajn eblojn por kontentigi la multspecajn postulojn, rezulte la revuo ne eviteble ricevas iom miksan aspekton laŭ enhavo kaj nivelo: apud vere sciencaj artikoloj troviĝas ankaŭ raportaĵoj post urbaj krozadoj, informadoj pri tutmondaj eventoj de la medioprotektado, rubriko por la „Junaj medioprotektantoj", aferoj de la enlanda naturprotektado, eĉ oficialaj komunikaĵoj, kaj multspecaj aliaj publikaĵoj el la ampleksa temaro. Ŝajnas, ke la redakcio devos laŭeble baldaŭ krei la plej konvenajn formojn kaj stilon al tiu enhavo-gamo, per kiu oni povos plej taŭge trafi la bezonojn de la vasta legantaro.

Tiun celon servas nun kolore presitaj ekologiaj vojaĝraportoj, tiuj de ekspedicioj, enlandaj raportaĵoj, ankaŭ praktikaj konsiloj kaj rekomendoj al junuloj, al amikoj de la naturo. Krom la supre menciitaj rubrikoj kaj raportoj de la propraj informistoj, ankaŭ alte premiitaj enigmo-konkursoj celas altiri al la revuo la intereson de la publiko. Cetere, tion celas – en la kluboj kaj aliloke – la publikaj diskutoj fare de la redakcio, prelegoj kaj filmprezentoj, ĉijare jam ankaŭ la organizataj ekskursoj por naturprotekto. Okaze de la *25a datreveno de la novtipa* **Búvár**, la Entrepreno por Gazeteldono organizis *jubilean fotokonkurson* (kun premioj de 30 000 forintoj). El la plej belaj koloraj kaj nigre-blankaj fotoj – kun dokumentoj pri la revuo – estis organizita aŭtune de 1981 *jubilea fotoekspozicio* en salono de la Sciencpopulariga Societo.



Kovrilfoto de Búvár

Disvastigi kaj profundigi la ideon de la natur- kaj medioprotekto, jen kio restas daŭra celo de la redaktado. En ties signo la redakcio konstante strebas praktike helpi kaj idee eduki la legantaron al respekto de la homa medio, al vera amo de la ne-anstataŭigebla naturo.

D-ro György *Lányi*
ĉefredaktoro de revuo **Búvár**

Miklós Tóth-Máté

VESPERMANĜO EN LA RESTORACIO, „KVAR FIŜISTOJ"

Sinjoro Kovács kaj lia edzino interkonatiĝis kun la skotaj geedzoj apud la lago Balatono. La granda, ruĝa pilko, havanta blankajn punktojn, ruliĝis antaŭ sinjoron Kovács, li reĵetis ĝin, la skota viro dankis, poste la kvaropo ludis jam kune, kaj intertempe ili konversaciis angle. Sinjoro Kovács ĝojis, ke li havis okazon ekzerci la lingvon. Li opiniis, ke ili estas angloj, kaj malkovriĝis nur poste, ke ili estas skotoj.

La skota viro proponis post la banado, ke ili vespermanĝu kune en la restoracio „Kvar fiŝistoj". Ili ŝatus gustumi la famajn kaj bongustajn hungarajn fiŝsupon kaj vinon. Sinjoro Kovács malsereniĝis momente, sed poste li kapjesis komplezeme, ke ĉio estas en ordo. Ili konsentis renkontiĝi vespere je la oka horo en la restoracio.

– Jen, kio al ni mankis – sinjoro Kovács ĝemis, kiam ili restis solaj. – Mi ne antaŭvidis tiun ĉi elspezon, ĝi estos minimume kvincent forintoj.

– Ne farsu – alrigardis lin sinjorino Kovács –, ĉu vi imagas, ke pagos vi la konton? Ja, ili invitis nin! ...

– Ili estas skotoj – mangestis sinjoro Kovács –, ili ĝojas tiam, kiam ili povas senpagumi. Ĉu vi konas la ŝercon, kiam la skoto... – Li rakontis la ŝercon, sed sinjorino Kovács ne povis ridi elkore. Ŝi pensis pri la vespera elspezo, kaj plej volonte ŝi estus revojaĝonta al Budapeŝto.

– Ĉu vi rimarkis la vizaĝon de tiu viro? – demandis la skota virino, kiam ili estis jam for de la geedzoj Kovács.

Li rigardis vin, kvazaŭ li volus murdi, kiam vi proponis la vespermanĝon. Ĉi tiuj estas sovaĝaj homoj. Mi aŭdis, ke ili portas ankaŭ tranĉilojn, kaj ili pikadas, kiam ili trinkas!

– Eh, li estas inĝeniero...

– Ankaŭ tiam: ilia temperamento estas tia! Eble li iras en sian oficejon ĉevaldorse, kaj li trinkas la brandon kiel la akvon. Mi aŭdis, ke foje hungara viro...

Ŝi rakontis historion, kaj la frunto de la skota viro nubiĝis. Ĉu vere li eraris farinte tiun inviton?

La kvaropo sidis vespere en la restoracio iom embarasite, kaj konversaciis ĝentile pri la beleco de Balatono. Poste oni mendis la vespermanĝon. La skotoj manĝis fiŝsupon kaj kazeitan nudelon, kaj post ĝi ili trinkis blankan vinon. La geedzoj Kovács mendis farĉitajn ovojn kaj Coca Cola.

– Mia stomako... – sin ekskuzis sinjoro Kovács, kaj rapide li kalkulis en si la atendeblan sumon de la konto. Sinjorino Kovács, kiu parolis iomete nur france, klopodis klarigi al la skota sinjorino, ke ŝi sekvas malgrasigan dieton depost du semajnoj. Ŝi manĝis hodiaŭ nur du persikojn.

Oni muzikis bele en la „Kvar fiŝistoj", kaj sinjoro Kovács komencis farti bone. El la dua botelo de la vino kiun mendis la skoto, ankaŭ li trinkis. La skota sinjorino ektremis, kiam sinjoro Kovács eltrinkis la glason da vino, kaj kiam li etendis la dekstran manon per abrupta movo en sian poŝon por ŝerci cigaredon, ankaŭ la brovoj de la skoto kuntiriĝis. Poste okazis nenio. Respektive tio, ke post la konsumo de la tria glaso da vino ili fartis tre bone, kaj sinjoro Kovács mendis por si mem porcion da rostita hepato kun kukum-salato, tute forgesinte sian „stomakon". Sinjorino Kovács mendis rostitan karpon, dirante, ke ĉi tiun manĝaĵon oni povas konsumi ankaŭ dum la malgrasiga dieto.

Ili komencis prepari sin ĉirkaŭ noktomezo por hejmeniro, kaj tiam la bonhumoro de sinjoro Kovács malaperis abrupte. Ja, ili trinkis kvin botelojn da vino kaj manĝis multe da manĝaĵoj. Li eltiris sian monujon per malserena movo, sed la skoto ekkaptis lian brakon rapide.

– Ne... mi petas! ... Kion vi volas fari! ?

– Mi pagos – sinjoro Kovács alrigardis lin mire –, se vi permesas, ĉi tie mi estis la dommastro, finfine ni estas en Hungario!

– Tio ne eblas – la skoto ĝemetis malpeziĝante –, estis mi, kiu invitis vin. Permesu al mi ordigi ankaŭ la konton.

Li vokis la kelneron, kaj pagis elegante. Ankaŭ trinkmonon li donis, almenaŭ cent forintojn, poste li vokis la ciganmuzikestron kaj ŝovis kvincent forintojn en lian manon.

– Ĉardaŝ-reĝo – li diris, frapante la ŝultron de la ciganmuzikestro. – Ja! Bravo! Treege mi dankas!

Je la adiaŭo la skoto premadis longe la manon de sinjoro Kovács, kaj petis lin, se li vojaĝos al Skotlando, nepre li vizitu ilin. Sinjoro Kovács kapbalancis ridete, kaj li sciis, ke li neniam vizitos Skotlandon. Sed tamen li promesis.

Hejme – kiam ili pretigis sin enlitiĝi – sinjorino Kovács diris:

– Mi estas certa, ke en la vejnoj de tiu ĉi skoto fluas hungara sango. Lia prapatro estis eble hungaro! Ĉu vi rimarkis, li donis al la ciganmuzikestro kvincent forintojn? ! Li efektive disĵetas la monon...

Antaŭ la hotelo la skota sinjorino ekstaris abrupte, kaj diris al la skoto:

– Do, ni ne povis trovi verajn hungarojn! Iu praulo de ĉi tiu sinjoro Kovács eble estis skoto. Li lasis, ke vi pagu la tutan sumon de la konto, li ne protestis...

– Sed mi malpermesis al li pagi...

– Li povus esti pli insistema! Mi aŭdis, ke hungaroj donas ankaŭ sian ĉemizon al siaj gastoj. Tiu ĉi... ĝojis, ke li povis senpagumi. Kaj eble li ne havas tranĉilon, kaj li certe piediras en sian oficejon, por ke li ŝparu la prezon de aŭtobusbileto! ...

La geedzo-paroj ekdormis trompiĝinte. En la sonĝoj ili renkontiĝis kun „veraj" skotoj kaj „veraj" hungaroj.

El la hungara: István *Gádory*

ORIGINALA POEZIO

Imre Szabó

Balbuta psalmo

Multtura krio – Prago
(mi ne vidis ankoraŭ Pragon)
Prago krias, mi krias, la sopiro krias
mi dampas en silento
mi nur imagas la kriojn
oblikvajn lumstriojn tra la cerbo
silente sonĝas la morgaŭo
griza, pala, fuma, maŝinbrua
skelete skiza
kaj mi scias
ie loĝas tamen
ie loĝas la fonto de lumoj
la erco de krioj
ie loĝas vi mem
en nia dampa vivo.

Euclides Carneiro de Silva

Memadorado

Vi konstruis lumturon,
por ke ĝi surbrilu vian vizaĝon...

Vi invitis la marondaron,
por ke ĝi aplaŭdu vin laŭ via paŝejo...

Vi centris ĉiujn viajn pensojn kaj aspirojn
en vi mem...

Ekhaltu dummomente!
Jam estas tempo levi la okulojn
kaj ĉirkaŭrigardi la mondon!

Mi ja vetas,

ke vi neniam konsciis pri la ĝojo
de fluanta akvo...

ke vi neniam rimarkis la festecon
de kantanta birdo...

ke vi neniam observadis la feliĉan sintenadon
de malfermiĝinta floro...

ke vi neniam pensis pri la entuziasmo
de ĝerminta semo...

ke vi neniam ĝuis la plezuron
aĉeti donacon...

ke vi neniam sentis la kontentecon
skribi dankleteron...

ke vi neniam spertis la feliĉon
suprenlevi falinta homfraton...

Feliĉo vin sciigas,
ke foje kaj refoje ĝi pasis apud vi,
sed vi ĝin preteratentis,
ĉar, kun fermitaj okuloj,
vi estis en ekstaza memadorado!

Kris Long

Paŭlo kaj Brehť: «Ne fermu la buŝon al bovo draŝanta»

(Read. 25:4, 1 Kor. 9:9,
Kaŭk. Kretcirklo)

„Ĉu pri la bovoj Dio zorgas
aŭ ĉu li diras tion tute
pro ni? " – Jes, leku la kuleron
bakante – „Plugu kun espero" –
al pluvo, ĉu, aŭ nur greneroj
(spiriton semi, karnon draŝi)
por sklavoj? Legu, jen malkaŝe:
ho, Paŭlo, „espero al partopreno"
– „la valon al la akvumontoj",
ĉu ne, „por frukti"?
Jes, volonte
– kaj pri la bovoj zorgu Kristo:
Maria Magdalena ja
supozis lin la ĝardenisto.

John I. Francis

Estingo?

Kia la esto?
Dia portret'?
Kiu stadio?

Nulen la kresko:
ruza ŝanĝet',
fine nenio.

Vivi en penso?
Post la elfet'
Kien racio?

En la sendinto?
En la sendit'?
Ter' aŭ etero?

Kuŝe en vindo,
karna solid',
ĝis degenero?

Fluge; lumpinto,
kiel bolid'
aŭ efemero?

Kie la esto
post la elfet'
vivis? En penso,
tero, etero?

Terno, eterno?

Julio Varga

La vorto

Pikil' ne estu vorto, kaj ne vanta. –
Balzamo, resaniĝon donacanta!

Ne kojno, kiu ĉiam nur forigas. –
Agrafo, kiu korojn bukas, ligas!

Ne estu ĝi malhoma, aŭ detrua. –
Humana, varma, helpa kaj konstrua!

De l' bono, ver' deviu ĝi neniam,
atingu ĝis la suferanto ĉiam.

Konsole ĝi aspergu sur homfraton,
de l' far' ricevu ĝi aŭtoritaton.

Sur padoj ĝi pac-anoncante iru,
al voĉ' de nia panjo ĝi similu.

Ĝi estu milda, mola kaj brakuma,
samkiel serenad' en nokt' lunluma.

BUDA-FLAX
HUNGARIA
Lenfonó és Szövőipari Vállalat
ANKAŬ EN NIA SPECIMENA VENDEJO
Budapest, Váci út 15.
aĉeteblas veloj WINDSURF;
blanka por 3120,– Ft,
kolora por 3610,– Ft.
PRODUKTAS:
LINŜPINA
KAJ TEKSINDUSTRIA
ENTREPRENO

MIROSLAV KRLEŽA pri ENDRE ADY



Miroslav Krleža

Miroslav Krleža *(hr-leja) la granda kroata verkisto internacia famiĝis precipe pro siaj dramoj (En agonio, Gesinjoroj Glembay, Leda k.a.), kiujn prezentis teatroj tra la tuta mondo. Sed dum sia longa vivo Krleža publikigis grandegan verkaron ankaŭ en la plej diversaj ĝenroj. Apud volumoj da poemoj, li verkis multe da noveloj kaj romanoj, inter kiuj prezentas apartan valoron la grandioza romano-serio „La flagoj", admirinda kavalkado de sortoj kaj sociaj fenomenoj en la ŝtorma fluo de la moderna historio.*

Krleža naskiĝis ankoraŭ en la iama Aŭstra-Hungara Monarkio (Zagrebo, 1893.), kiel junulo studis ankaŭ en Budapeŝto, kaj ĝis sia morto (1981) li ne ĉesis okupiĝi profunde pri sorto de la popoloj en meza kaj suda Eŭropo. Liaj meditoj pri tiuj problemoj aperis jen kiel politikaj, jen kiel literaturaj aŭ estetikaj eseoj, plejparte en literaturaj revuoj de li fonditaj. Multe li okupiĝis ankaŭ pri hungaraj aferoj, pri hungaraj verkistoj, inter ili pri la granda moderna poeto Endre Ady /ady/ *(bone konata en Esperantujo pro la majstraj tradukoj de Kalocsay). Sube ni publikigas el la multaj rimarkoj de Krleža koncerne la vivon kaj verkaron de Ady, kolektitajn en lia kvin-voluma verko: „Panoramo de observoj, fenomenoj kaj nocioj".*

Sintezo

Kiel Sándor *Petőfi* estas sinonimo de 1848, nomo en si mem esprimanta la antaŭrevolucian hungaran generacion, tiel same Ady simbolas la lirikan sintezon de ĉiuj tendencoj kaj politikaj esperoj de la modernaj hungaroj. La literaturan-politikan fenomenon de Ady oni povus grafike esprimi per elipso rotacianta baze de du fokusoj: inter la jakobena vervo de Petőfi, portanta flagojn kun alta fido je fina venko de la „revolucio", kaj inter la malespero de „La maljuna cigano" de Vörösmarty, malĝojanta dum la longaj kaj ŝtormaj noktoj hungaraj. Kantante inter tiuj du fokusoj, Ady reprezentas la tutan amplekson de la hungaraj literaturaj-politikaj dilemoj, kiujn li traplektas per enuo de homo senpova, kiu tamen konscias pri sia manko de volo kaj serĉas vane la misteran vorton, detruontan la Prometeeske ĉenantajn rokojn de sia destino.

(1922)

Revulo

En la vortoj de Ady la versoj moviĝas kvazaŭ ondoj de muziko, kiujn sperta mano tiras per arĉo tra la lirikaj motivoj. La luno de Ady vojaĝas en la ĉielaj altoj kvazaŭ „malnova omnibuso super la blank-kalkitaj vilaĝaj turoj"; kun siaj „de inko makulitaj fingroj" Ady sonĝis dum sia tuta vivo en kaosaj sferoj de muzikantoj kaj trubaduroj, tra pluvoj kaj nebuloj de tiom da revoj kaj iluzioj: per ebriiga kaj venena lingvo li kantis pri supernaturaj fortoj, pri skarlata kaj arda volupto, kaj el tiuj vers-incendioj li lanĉis alten flamajn sparkojn de sia pasio, raketojn de siaj triumfaj, lirike talentegaj inspiroj.

(1930)

Profeto de Bibliaj malfeliĉoj

Ady, laŭ deveno nobelo de Transilvanio, ido de kalvinana pastro, levis sian voĉon simile al la profetoj de Bibliaj malfeliĉoj. En la tragika sorto de *Rákóczi* li vidis la simbolon de ĉiuj senesperaj luktoj por la hungara suverenco. En simpla, rustika lingvo de la popolkantoj li kantis pri la piedpremitaj kaj dekumitaj ribeluloj de Rákóczi. Iliaj ombroj ĉe flamoj de la tendarfajro, iliaj kamparanaj dialogoj esprimis la senelirecon de la hungara sorto. Tiuj nokturnoj de profeta malhelo, la ĝemoj kaj la plebaj-krudaj rimoj pleniĝis de timo, ĉagreno kaj paniko antaŭ la alvenonta, neevitebla tragedio.

(1930)

La lasta naŭzo

Vivi inter maŝinoj kaj cirkvitoj, sur asfalto en la haladzo de moderna grandurba realo, rigardi la bandon de demone obsedatoj sidantaj „kvazaŭ pavoj sur la dom' estrara", rigardi la mizerajn servutulojn sklave „obei sonorileton de la grafa alvoko", rigardi la ĝendarmojn kaj imperiestran armeon, la Vienajn generalojn en la hungara ĉefurbo – kaj skribi poemojn, tragike senhelpe, dum la kvar jaroj de tiu sangoplena „stab-manovro": jen la temoj de la milita liriko de Ady. Pli kaj pli konscie li iris suben sur la spiralo de sia estimo al „Hungario de la sinjoroj" ĝis la plej malalta kaj malespera grado. Li kantis pri Hungario kiel pri io tre postrestinta, kien li rerigardas el la ega foro de sia intelektula, abstrakta emigrado. Forkuri, kaj eĉ ne retrorigardi! Sed anstataŭ kolerego, el Ady gutis laca rezigno: per plumo li ja ne povis haltigi la neeviteblan tragedion, tial li falis en sian lastan naŭzon. Kelkajn monatojn post fino de la milito Ady foriris: kiel reĝo li estis entombigita: li ĝisvivis la Respublikon, kaj kiel ĝia profeto li ekiris en la morton antaŭ ties morto.

(1922)

Laŭ traduko de Rade *Škalamera*

Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado

D-ro Árpád Rátkai

4. La movado lingvigas la lingvoplanon

La malfacileco de Volapuko ofte nur plifortigis la antaŭjuĝon, ke oni ne povas atingi aŭ superi la kvalitojn de la „naturaj" lingvoj. Sed ankaŭ male: la relativaj sukcesoj de Volapuko samtempe ankaŭ *plifirmigis la konscion, ke la lingvo estas homa kreitaĵo, sekve kreebla ne nur spontane, sed ankaŭ konscie.* Nur parton de la eblecoj montris Volapuko, aperis jam ankaŭ Esperanto, kial ne atingi ankoraŭ pli grandajn sukcesojn? *Dum 26 jaroj (1879–1905) aperis proksimume tiom da novaj lingvoplanoj, kiom entute dum jarcentoj antaŭ Volapuko.*

Tiu duobliĝo restis unika, ĉar nova duobliĝo eĉ ĝis hodiaŭ ne okazis. La volapukaj gazetoj ĉesis unu post alia, kaj aperadis efemeraj revuoj por kaj en Pasilingua, Mundolinco, Dil, Tal, Homapar, Idiom-Neutral, Latino Internasionik, same plurcent libroj kaj broŝuroj.

Multaj kapablaj interesiĝantoj ne aliĝis al la jam ekzistanta internacilingva movado, eĉ la movadanoj dizertis: ili prilaboris propran lingvoplanon aŭ modifis la jam aperintajn. La Volapuka Akademio de 1889 fariĝis diskutforumo, eĉ batalterenо por kelkaj el ili.

Tiu *lingvoplanada eŭforio* ne indulgis eĉ la ĵusestiĝantan malgrandan esperantistaron: la sola Esperanto-revuo fariĝis forumo de reform-diskutoj. En 1894 oni voĉdonigis la abonantaron, kies „granda plimulto" (157 voĉoj!) deziris „restigi senŝanĝe la malnovan formon de nia lingvo." Sekvo de la diskuto estis malkresko de la abonantaro, ondo de novaj dizertoj. Eĉ la unua esperantista societo, la Nurenberga, post la apero de Idiom-Neutral aliĝis al ĝi.

„Unuigi ĉiujn amikojn de la mondlingvo en la komuna laboro" celis la revuo *Interpretor* (Leipzig 1889-1890) kaj *Linguist* (Hannover 1896-1897). Zamenhof en 1897 samcele dissendis ĉ. 6000 invitojn al gazetoj kaj reprezentantoj de la diversaj lingvoplanoj por organizi „skriban kongreson" por priparolado kaj decidado de la demando pri L.I." Sed *la provoj por unuecigi la fortojn restis vanaj,* ĉiu daŭrigis sian propran vojon. Kaj la sinsekvaj fiaskoj seniluziigis la adeptojn ne nur pri la konkreta lingvoplano, sed pri la tuta afero.

Esperanto estis nur unu en la kavalkado de la lingvoplanoj kaj nur vegetis ĝis la unuaj jaroj de la 20a jarcento. Tamen estis signoj, kiuj diferencigis la sorton de la Zamenhofa lingvoplano de ĉiu alia, ekz. la reveno de la dizertuloj. (Ekz. el la unuaj esperantistoj, la malkontentiĝinta Antoni Grabowski en 1896 elpaŝis kun sia nova lingvoplano, sed baldaŭ realiĝis al Esperanto.) Tiuj centoj de lingvoplanoj fariĝis bibliografiaj raraĵoj, *lingviĝis nur unu: Esperanto.*

Karakteriza epizodo de la krizaj jaroj estis la cenzura malpermeso sendi *La Esperantiston* en Rusion. Ne povante elteni la abruptan perdon de la rusiaj abonantoj, la revuo tuj ĉesis.

La nova revuo, *Lingvo Internacia* aperis en *Svedio* (dec. 1895-1899). Malgraŭ la monhelpoj ankaŭ ĝi baldaŭ devis anonci ĉeson. Nova „mecenato", posedanto de eta presejo, la hungaro Pál Lengyel tamen daŭrigis ĝian eldonadon en la hungara urbeto *Szekszárd* (1900-1904).

La rolo de tiuj periodaĵoj estis tre gravaj: ili kuntenis la malfortan movadeton. Krom la *pormovada karaktero* ili estis la plej gravaj terenoj de la lingva evoluo, estante samtempe *ankaŭ literaturaj revuoj.* La monde diaspora abonantaro estis kelkcento de la lingvon pleje uzantaj aktivuloj.

La renaskiĝanta movado

De 1902 jam salte kreskis la nombro de la E-gazetoj (Tab. 1). *Lingvo Internacia* – de okt. 1904 jam en Parizo – finfine stabliĝis ankaŭ finance, sed perdis sian centran rolon en la movado: estis nur unu el la jam pluraj gravaj periodaĵoj.

La verkoj aperintaj en E ĝis 1903 jam superis kvante la Volapukan libraron, kaj la afero statis, same ankaŭ koncerne la lernilojn. La eldonagado daŭris. En la belliteraturo la ĉefa tendenco dekomence estis tradukado de la klasikaĵoj, Zamenhof estis la plej fervora tiuterene. Aperis ankaŭ originalaĵoj kaj sciencpopularigaj verkoj. Riĉiĝis la lingvo, edukiĝis tradukokapabla kaj verkokapabla tavolo de la esperantistaro.

La nombro de la lokaj societoj en la unuaj jaroj de nia jarcento salte kreskis, kaj baldaŭ superis tiun de la iama volapuka movado (1901: 26; 1905: 308). En 1905 triono de la societoj funkciis en Francio, kaj nur 26 ekster Eŭropo (Tab. 2).

Surbaze de la tiutempaj publikaĵoj ni provis taksi la *socian konsiston* de la tiutempa internacilingva movado:

la Volapukan en 1889, la Esperantan dum siaj unuaj 16 jaroj (1887-1902). Jen la sumo de nia rezulto:

	V-istoj	E-istoj
intelektuloj	61%	79%
oficistoj, salajruloj	20%	14%
ceteraj	19%	7%

Do, *la internacilingva movado estis movado de intelektuloj* kaj antaŭ, kaj post la lingvoŝanĝo. Mezgradajn studojn finis 80-90% de la movadanoj, kaj la tre granda plimulto estis diplomitoj. Ĉiuj gravaj tavoloj de la tiutempa intelektuaro estis reprezentataj en la movado. Tamen, la plej gravaj estis la pedagogoj: 38% de la volapukistoj kaj 24% de la esperantistoj. (El la esperantistaro: 11% estis ĵurnalistoj, verkistoj, 11% estis kuracistoj, farmaciistoj kaj 9% studentoj).

En la komencaj jaroj de nia jarcento la nombro de la esperantistaro jam certe atingis kaj superis la nombron de la iama volapukistaro, kaj impete kreskis plu. En 1905 jam certe *plurmil esperantistoj* apartenis al la movado, kaj ili estis *la plej diaspore vivanta lingvo-komunumo en la mondo.*

La triumfo de la buŝa lingvo

La etnaj lingvoj komence ekzistis nur en buŝa formo. La apero de la skribo signifis la sojlon al la civilizacio, dum kiu la skribitaj tekstoj malrapide disvastiĝis. La Internacia Lingvo evoluis inverse. Ĝi aperis kaj disvastiĝis en skriba formo (kiel lingvoplano), kaj sekvis ĝin la parolata lingvo.

La unua konversacio en Esperanto – almenaŭ laŭ forta tradicio – okazis jam en 1887, inter Antoni Grabowski kaj Zamenhof en Varsovio. De 1895 okazis la unuaj internaciaj vojaĝoj de svedaj kaj rusaj esperantistoj. De 1903 oni aranĝis la unuajn internaciajn renkontiĝojn. Sed la plej grava evento tiurilate estis la *unua internacia kongreso de la esperantistoj en Bulonjo* (Boulogne-sur-Mer) *1905 08 05/13.* La facileco kaj flueco de la buŝa lingvo mirigis kaj entuziasmigis la 688 partoprenantojn venintajn el 30 landoj.

La precizeco de la lingvo evidentiĝis dum la kongresaj diskutoj. Ankaŭ la privataj interparoloj fluis vive, la babilado en la restoracioj kaj dum la promenadoj kaŭzis emocian atmosferon. Al la triumfo de la buŝa lingvo kontribuis ankaŭ la ĝuo de la unua grava teatra prezentado en la Internacia Lingvo. La komedion *La edziĝo kontraŭvola* ludis sep diversnaciaj amatoraj geaktoroj. Plia aspekto de la lingvo estis la elokventeco: la kongresparolado de Zamenhof iĝis la unua klasika oratoraĵo de la lingvo.

Tiuj rezultoj de la movado kronis la ĝistiamajn atingojn, kaj signis la finon de grava etapo, dum kiu *la internacilingva movado lingvigis la lingvoplanon de Zamenhof,* proksimume dum la jaroj 1887-1905.

Tabelo 1

Nombro de la volapukaj kaj esperantaj revuoj

	V	E		V	E		V	E
1880	–	–	1890	14	3	1900	2	3
1881	1	–	1891	10	2	1901	2	3
1882	2	–	1892	7	1	1902	2	12
1883	3	–	1893	6	1	1903	2	21
1884	4	–	1894	4	1	1904	2	26
1885	4	–	1895	5	2	1905	2	36
1886	6	–	1896	6	2	1906	1	45
1887	11	–	1897	2	2	1907	1	61
1888	10	–	1898	2	3	1908	1	99
1889	14	2	1899	1	3	1909	–	106

Tabelo 2

Nombro de la internacilingvaj lokaj societoj

volapukistaj		esperantistaj				
1889	**lando**	**1889**	**1902**	**1903**	**1904**	**1905**
20	Aŭstrio-Hung.	–	3	3	11	16
3	Belgio	–	1	1	7	9
4	Britio	–	1	18	36	58
–	Bulgario	1	6	11	12	12
9	Danio	–	1	1	1	1
5	Francio	–	18	38	56	102
106	Germanio	1	6	8	22	32
9	Hispanio	–	1	2	3	12
23	Italio	–	2	4	6	7
20	Nederlando	–	1	2	6	6
2	Norvegio	–	–	–	–	–
3	Rusa Imperio	1	4	6	8	10
14	Svedio	–	1	3	3	8
17	Svisio	–	–	2	6	10
22	ekster Eŭropo	–	1	9	11	26
259		*3*	*44*	*113*	*186*	*308*

PERSPEKTIVO DE ESPERANTO ANTAŬ LA IDO-SKISMO

En la korprema, mistika etoso de la Bulonja kongreso Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto festis ne nur la senduban sukceson de sia artefarita lingvo, sed esprimis ankaŭ la konvinkon, ke alvenis la uverturo de nova, brila epoko de la tuta homaro, baldaŭ efektiviĝos lia homaranisma ideologio, efektiviĝos nepre la iamaj idealoj pri internacia kompreniĝo kaj – helpe de interpopola lingvo – ankaŭ la eterna paco. Dum la kongreso li deklaris: kvankam „modesta estas nia kunveno", tamen „nun la unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi." „Post multaj miljaroj da reciproka surda-muteco kaj batalado, nun en Bulonjo-sur-Maro fakte komenciĝas en pli granda mezuro la reciproka kompreniĝado kaj fratiĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro; kaj unu fojon komenciĝinte, ĝi jam ne haltos, sed irados antaŭen ĉiam pli kaj pli potence, ĝis la lastaj ombroj de la eterna mallumo malaperos por ĉiam. Gravegaj estas la nunaj tagoj en Buolonjo-sur-Maro, kaj ili estu betanaj! "

Certe ne malmultaj adeptoj opiniis same, sed ankaŭ tio estas fakto, ke aliaj – verŝajne la plimulto de esperantistoj – sub forta influo de la franca intelektuaro inklinis preteratenti la ideologian bazon kaj pli multe interesiĝis pri la konkretaj, pri senpere praktikaj utiloj de la nova lingvo. Al ili apartenis ankaŭ Adolf Altenburger, Hungarlanda pioniro de la ideo de internacia lingvo. La pruvoj estas klare videblaj en lia hungarlingva verko: „A nemzetközi nyelv kérdése és az eszperantó mint e kérdés legjobb megoldása" (La problemo de internacia lingvo kaj Esperanto kiel la plej bona solvo de tiu ĉi problemo.) Ĝi estis verkita inter la unua kaj dua kongresoj, kaj aperis en 1906. La libreto enhavas logike vicigitajn argumentojn pri la bezono de internacia lingvo, konigas la historion de Esperanto, prezentas la akiritajn rezultojn kaj konjektigas grandegan perspektivon per skizo de mondskala laborado sub la direktado de francaj eminentuloj. Ĉe la fino de la eldonaĵo ne mankas faktoj pri hungaraj kontribuantoj al la disvastigo de Esperanto, kaj por la interesitoj – kiel la plej grava pruvo – estas tie ankaŭ Esperantaj tekstoj, gramatiko kaj vortareto.

La verko de Adolf Altenburger kun multaj siatempaj dokumentoj bone montras, ke antaŭ la Ido-skismo en la mondlingva movado ekzistis du fortaj tendencoj starantaj unu kontraŭ la alia: la Zamenhofa, respektive slava mistikismo kaj la franca raciismo. Tiu ĉi lasta klopodis iom post iom ŝovi flanken la alian, transpreni la gvidan rolon kaj helpe de ekstermovadaj aŭtoritatoj senprokraste venkigi la artefaritan lingvon, laŭeble Esperanton aŭ iun ĝian perfektigitan variaĵon. Por realigi tiun planon estis necesaj:

1. Propraj herooj, kompetentaj reprezentantoj de la lingva inventaĵo; grandaj homoj, eminentuloj, kiuj ankaŭ ekster la movado havas jam gravan socian, politikan aŭ kulturan influon;

2. Forta apogo de scienculoj, eĉ sciencaj institutoj, ilia internacia kunlaborado;

3. Fine, apogo de grandpotencoj – kiuj direktas la mondpolitikon – la plej prestiĝaj internaciaj sciencaj, ekonomiaj k.s. organizaĵoj.

Ĉe Altenburger la vera heroo jam estis ne Zamenhof, li pli ofte citas pensojn de L. Beaufront, L. Couturat, A. Michaux, H. Schuchardt, L.N. Tolstoj, Max Müller kaj aliaj. Pri la fama lingvisto, Max Müller li mencias – kun granda teoigo – „nepran adeptiĝon" tuj post la ekkono de Esperanto kaj deklaron: „Esperanto indas je la unua loko inter la konkurantaj lingvoj. Nature estas menciita ankaŭ la nomo de Zamenhof – ja kion fari, se li estas tamen la aŭtoro – sed samtempe estas tute neglektita lia tre grava laboro en la lingvo-disvastigo kaj movado-kreo. Ĉirilate la honoro jam apartenas al L. Beaufront kaj al aliaj eminentuloj, reprezentantoj de grandaj nacioj. „La estro de la Esperanto-movado estas la entuziasma kaj lerta L. Beuafront, la scienculo, kiu tutan nacion, la kleran francan nacion gajnis por Esperanto; kio estas ne malgrava: la scienculojn." Samstile li skribas pri la gazeto „L' Esperantiste", „kiu per la publikitaj riĉenhavaj artikoloj" akiris multajn milojn da abonantoj." La Societo por la Propagando de Esperanto, fondita de L. Beaufront (1898) „gajnis milojn da kleraj homoj por Esperanto en ĉiu civilizita lando de la mondo" kaj la verkoj de L. Beaufront „gajnis la dubemulojn por la afero kaj silentigis la primokantojn".

La unua slogano – kiel enkondukaj vortoj – estas transprenita de L. Couturat (la invento de artefarita lingvo estas tiel grava, kiel tiu de la presado Gutenberga), la lasta kiel fina frazo de la libro fontas el la plumo de L. Beaufront: „Estas proksime la tempo, kiam la larĝa disvastiĝo de Esperanto mirigos ne nur la dubemulojn, sed ankaŭ ĝiajn plej fervorajn adeptojn." La bazo de la tuta libro estas la verko de Zamenhof: Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia, ne nur laŭ la enhavo kaj logika vicordo, kelkloke estas laŭvorta transpreno sen citiloj, sen la mencio de la vera aŭtoro. Tiu ĉi rilatas ankaŭ la unuajn frazojn de la libro, ĝuste post la menciita slogano de Couturat (ĉe Zamenhof tiuj estas ĉe la komenco de la dua ĉapitro) „Ĉu lingvo internacia estas bezona? Tiu ĉi demando per sia naiveco elvokos ridon ĉe la estontaj generacioj, tiel same kiel niaj samtempuloj ekridus ekzemple ĉe la demando: „ĉu poŝto estas bezona? " .

Adolf Altenburger faris belan liston pri doktoroj, universitataj profesoroj, akademianoj, generaloj, mondfamaj sciencistoj; kies nomo iel estis rilatigebla al Esperanto, tiun li taksis ĝisosta esperantisto, arda batalanto de la

mondlingva afero kaj kvazaŭ neglektas tiujn, kiuj elstaras simple nur pro esperantisteco. Ne nur surpapere, tiutempe la Esperanto-movado efektive havis eminentan stabon: kaj sporadaj spertoj en certaj sciencaj rondoj, ĉe prestiĝaj institutoj estis vere esperigaj. Al la historio de la ideo mem apartenas brilaj nomoj: Bacon, Pascal, Descartes, Leibniz, Voltaire, Diderot, Condillac, Ampère, Nietzsche – inter hungaroj I. Széchenyi. Eĉ la laboro farita en organizaĵoj havis jam sian historieton: la Internacia Lingvistika Societo (fondita en Parizo, 1850) deklaris, ke internacia lingvo povas esti nur artefarita; la Amerika Filozofia Societo en Filadelfio (1887) ellaborinta principojn de planlingvo, pravigis la ekzistorajton de Esperanto; la Internacia Filozofia Kongreso (Parizo, 1900) akceptis la proponon de L. Leau, laŭ ties rezulto fondiĝis la Delegacio por Alpreno de Lingvo Internacia; dum mondekspozicioj (Parizo – 1900, St. Louis – 1904) Esperanto rikoltis rimarkindan sukceson, eĉ arĝentan medalon; rezultodona estis ankaŭ la iniciato de generalo Sèbert ĉe la Scienca Akademio en Parizo (la 9-an de aprilo, 1901), nome la prezento de Esperanto „la sciencistoj akceptis ĝin kun granda entuziasmo kaj unuanime agnoskis ties grandan signifon kaj la bezonon de disvastigo."

Ĝis la fino de 1905 oni akiris aprobon, respektive apogon de 195 kongresoj kaj sciencaj societoj, aliĝis pli ol 800 universitataj profesoroj (36 el Francio, la ceteraj el 20 nacioj). Adolf Altenburger liveris abunde nomojn, adresojn, ceterajn indikojn: necesajn informojn koncerne al aliĝebleco, tiel li sugestis la penson, ke Esperanto-movado staras jam ĉe la sojlo de la senpera venko.

Du jarojn poste la esperoj forvelkis. La Delegacio ne plenumis sian taskon, sed alportis Ido-skimon, danĝeran aventuron en kiu preskaŭ frakasiĝis la malforta ĉareto de esperantismo. La heroo-kreo produktis fiaskon, ĝuste ili fariĝis la „ĉefaj perfiduloj". En la kvara kongreso (Drezdeno, 1908) Zamenhof jam anoncis: „En la daŭro de la lasta jaro en nia afero okazis faktoj, kiuj maltrankviligis por iom da tempo la mondon esperantistan. Nun ĉio jam denove trankviliĝis." Kvankam la perdo estis nur 3-4 procentoj da „simplaj" esperantistoj, tamen okazis ne malgrava akcidento. La movado aliris turnopunkton, komenciĝis nova epoko en ĝia historio. Evidentiĝis, ke francaj raciistoj estas pli malprudentaj ol ceteraj esperantistoj starantaj plimalpli sur la Zamenhofa ideologia bazo; ankaŭ tio, ke la venko ankoraŭ ne estas proksime; la mondskala kaj serioza interesiĝo de scienculoj estis nur ŝajna. Pruviĝis, ke mankas ankoraŭ gravegaj antaŭkondiĉoj: multflanke evoluigita lingvo, organizita esperantistaro, firma homamasa bazo, vera maturiĝo kun certa tradicio kultura. La movado turniĝis internen, por ke post interna refortiĝo ĝi povu denove suriri la vojon, kiu ŝajnis esti sufiĉe glata jam antaŭ la Ido-skismo.

Tamen restis kelkaj aferoj, kiuj apenaŭ ŝanĝiĝis de tiu tempo: eĉ nuntempe multloke oni kutimas propagandi Esperanton laŭ recepto de Adolf Altenburger kaj ceteraj samtempuloj. Tio estas: prenu iom da vero, troigu ĝin ĝis la ĉielo, aldonu abunde blagon – laŭ maniero de lertaj/spertaj kolportistoj – kaj liveru tiun allogan frandaĵon varme al la homaro, precipe al lingvistoj, universitataj profesoroj k.s. Pri mankoj, eventualaj malfacilaĵoj, pri laboro farenda diru ne eĉ unu vorton, ĉar la malkaŝita, nuda vero forvaporiĝos la apetiton. Kaj ĉu strange, ke la homoj apenaŭ inklinas konsumi tiun senlime laŭditan nutraĵon? Kaj eĉ se oni kredas ĉion ĉi: ili preferas atendi la finan venkon de Esperanto, kaj nur poste eklerni ĝin; kial ne, se la venko jam estas tiel proksime, kiel esperantistoj asertas?

Ernő *Csiszár*

Marinko Ĝivoje (1919-1982)

Li ne „foriris el inter ni", kiel oni diradas eŭfemisme anstataŭ uzi la krudan vorton „mortis". Li forkuris. Marinko Ĝivoje finis, kiel li vivis.

Mi renkontis lin en Budapeŝto dum la Vintra Esperanto Ferio. Li helpis vendi esperantaĵojn, ĉar li ne kapablis resti senlabore. Jam estis planata la 5-taga kurso de Nyiregyháza. Ni invitis lin instrui tie, sed li ne havis tempon. Poste lia alta, svelta figuro, blankiĝintaj haroj, viglaj okuloj, magra vizaĝo aperis dum la teatra renkontiĝo. Li spektis la teatraĵon de János Elem „Ĉu vi jam vidis la piedsignon de l' Profeto? ", sed ne havis tempon por spekti la prezentadon de „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj".

Mi aŭdis legendon pri li: Ĝivoje, alveninte al la Budapeŝta UK en 1966, trovinte, ke nenio estas organizita por la gazetara servo, kiun li gvidontis, dum kelkaj horoj organizis ĉion. Trankvile, ridetante kaj vigle.

Mi renkontiĝis kun Marinko en 1970, en la Viena UK. Ankaŭ tie li gvidis la gazetaran servon, kie mi kunlaboris. Li estis vigla, bonhumora, kiel ĉiam. Li faris ĉion rapide, lerte. De tiu tempo, se ni vidiĝis en Esperantio, ĉefe dum Universalaj Kongresoj, ĉiam ni salutis unu la alian kiel malnovaj konatoj. Sed mi ne tute precize sciis kaj eĉ scias, kiu li fakte estis. Mi malfermas la katalogon de la libroservo de UEA. Rigardante la indekson de la aŭtoroj, apud la nomo „Ĝivoje, M." mi trovas indikojn pri 11 titoloj. Inter ili estas vortaroj, la fama kolekto „Esperantonimoj", kiu enhavas antonimojn, homonimojn, paronimojn kaj eĉ vortludojn de la Internacia Lingvo. Mi vidas titolojn de bibliografio de Esperanto en Jugoslavio, de la manlibro pri Esperanto en bibliotekoj. Estas ĉi tie la „Panoramo de Esperanta literaturo", „Biografioj de pli elstaraj jugoslaviaj fervojistoj esperantistoj", „Interesa Arkeologio". Krome troveblas la nomo de Ĝivoje (aŭ Gjivoje), kiel tiu de prelegisto kaj antaŭparolisto.

La nura tralego de la titoloj montras: li estis homo, okupiĝanta pri multaj flankoj de Esperanto, elstara organizanto, ĝisosta movadulo kaj krome, ni, kiuj persone konis lin, scias: li estis bonkora kaj helpema. Dolore estas perdi lin.

Péter András Rados

Bernard Golden

LA UNUAJ KORESPONDANTOJ EN ESPERANTUJO

Oni apenaŭ povas foliumi periodaĵon en Esperanto, ĉu malnovan, ĉu freŝdatan, sen trovi rubrikon pri korespondado. Ekde la estiĝo de la Internacia Lingvo, ekzistis entuziasmuloj, kiuj volis uzi Esperanton por interkomunikiĝo trans lingvaj bariloj kun homoj en la plej foraj regionoj de la mondo. La celoj kaj temoj estas tiel diversaj kiel la karaktero de la leterskribantoj mem. Ofte la interŝanĝo de leteroj estas nur la unua ĉapitro en longa vivhistorio liganta du samideanojn „edzperantiste". Aliaj homoj korespondas por akiri kolektindaĵojn aŭ por ekscii pri fakaj aferoj. Ĉiu povas korespondi – komencantoj kaj akademianoj, ordinaruloj kaj sciencistoj. Ankaŭ nevidantoj korespondas per surbendigitaj „leteroj". Pro la facileco de poŝtaj kontaktoj, ne devas ekzisti vere izolitaj esperantistoj.

Universala Esperanto-Asocio, konstatante la gravecon de korespondado por kunligi esperantistojn vivantajn dise en la granda diasporo de la Esperanto-movado, en 1957 fondis la Korespondan Servon Mondskalan kadre de siaj kulturaj kaj edukaj agadoj, por faciligi korespondadon.

La korespondaĵoj de gvidantoj de la Esperanto-movado estas ĉiam grava fonto de donitaĵoj pri la historio de la movado. Ofte citita ĉi-rilate estas la duvoluma kolekto *Leteroj de L.L. Zamenhof*, kiun prezentis kaj prikomentis prof. Gaston Waringhien. La plej frua letero en tiu ĉi kolekto datiĝas de la jaro 1901. En *Originala Verkaro*, kolektita de d-ro Johannes Dietterle, aperas kiel la plej frua korespondaĵo de la aŭtoro de Esperanto poŝtkarto, kiun li skribis al Vladimir Majnov la 14-an de novembro 1887. Ankaŭ Adolf Holzhaus, en sia verko *Zamenhof Leteroj*, kaj la plej ĝisdata *Iam Kompletigota Plena Verkaro de L.L. Zamenhof*, redaktita de Ludovikito, rigardas tiun mallongan tekston kiel la unuan poŝtan komunikaĵon de



La serio „iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof" jam atingis dek volumojn kun ĉ. 3600 paĝoj, dank' al la streboj de japanaj esperantistoj. Sur la bildo: la unuaj kvin volumoj

Zamenhof en Esperanto, pri kiu ni scias. Tamen, estas eble, eĉ probable, ke Zamenhof korespondis pli frue en Esperanto. Kun kiu? Kiu estis la unua homo, krom Zamenhof, kiu uzis Esperanton perletere?

Dokumentado pri la frua uzo de Esperanto por korespondado malabundas en la plej gravaj konsult-libroj. *Enciklopedio de Esperanto* listigas plurajn „unuajn eventojn" en la historio de Esperanto, sed mencias nur, ke la unua interlerneja korespondado internacia de infanoj okazis en 1903. La sama verko informas, ke la unua adresaro de esperantistoj estis eldonita de Zamenhof en 1889. Ankaŭ tiu dato estas post la jaro, kiam Zamenhof respondis al Majnov. Tiu ĉi certe skribis al Zamenhof en 1887, sed manke de la

teksto, estas neeble scii, ĉu li verkis ĝin en Esperanto aŭ ruse.

Estas aliaj kandidatoj por la honoro esti la unua korespondanto de d-ro Zamenhof. Unu el ili estas la pola kemia inĝeniero kaj literaturisto Antoni Grabowski, kiu poste atingis famon kiel la „patro de la Esperanta poezio". La aŭtoritata *Polski Slownik Biograficzny* (Pola Biografia Vortaro) rakontas, ke Grabowski, veturante al Ruslando tra Varsovio en 1888, konatiĝis persone kun d-ro Zamenhof, kaj tiam okazis la unua en la mondo interparolo en Esperanto. En alia verko, Julius Glück asertas, ke Grabowski, vojaĝante al Toruń en 1887, vidis la unuan lernolibron en elmontra fenestro, aĉetis ĝin kaj lernis la novan lingvon.

„Li tuj korespondis kun d-ro Zamenhof kaj en 1888 li vizitis nian majstron, surprizante lin per flua Esperanta alparolo." En la listigo de unuaj eventoj en *Enciklopedio de Esperanto*, la dato de la interparolado de Grabowski kaj Zamenhof ne estas 1888 sed unu jaron pli frue, 1887. Ĉu Grabowski renkontiĝis kun Zamenhof jam en 1887, aŭ ĉu la dato en la enciklopedio estas erara? Ŝajnas, ke oni devas akcepti la daton 1888 por la konversacio inter la du viroj. Grabowski ja havis okazon korespondi kun Zamenhof pli frue, sed ne estas certe, ĉu li faris tion en Esperanto aŭ en pola lingvo.

Alia pionira esperantisto el Pollando, Leo Belmont (pseŭdonimo de Leopold Blumenthal), postulas antaŭecon laŭ siaj propraj rememoroj. Kiam la „Unua Libro" aperis en montrofenestroj de varsoviaj librovendejoj en aŭgusto 1887, Belmont, tiutempe 22-jara studento en la Fakultato pri Juro de la Universitato de Varsovio, aĉetis ekzempleron. Ĝi plej verŝajne estis la pollingva versio. Li ellernis la lingvon tre rapide kaj la 27-an de septembro notis en sia taglibro, ke li konatiĝis kun d-ro Zamenhof. Estas dubo, ke li konversaciis Esperante; plej probable li uzis la polan lingvon. Ankaŭ duba estas la Esperanteco de la letero, kiun Belmont sendis al Zamenhof antaŭ sia vizito, en kiu li skribis „Vi venkos, sinjoro! ", ĉar nenie estas eksplicite dirite, ke ĝi estis en Esperanto. Belmont citas la tekston de tiu letero en alia letero adresita al Louis Couturat en Parizo en 1904. Zamenhof respondis la saman tagon, sed ne estas certe, ĉu en Esperanto aŭ en la pola lingvo.

Menciinda estas alia frua letero sendita al Zamenhof en 1887 de Pastro Aleksandro Dombrovski. Lerninte Esperanton en la aŭtuno de 1887 per la pola traduko de la „Unua Libro", li sendis al d-ro Zamenhof „mallongan esperantlingve verkitan letereton..." Kvankam ĝia teksto jam ne ekzistas, la letero de Dombrovski povas esti rigardata kiel la plej frua dokumentita Esperanta korespondaĵo.

Mi deziras prezenti ankoraŭ unu personon, kiu eble korespondis kun d-ro Zamenhof en Esperanto – antaŭ 1887. Ŝi estas Klara Silbernik, la edzino. Kvankam Zamenhof mem diris, ke li renkontiĝis kun sia estonta edzino „en la fino de 1886", kaj liaj biografoj elektas tiun daton aŭ la sekvan jaron, estas eble, ke la intervidiĝo okazis pli frue, en la vintro de 1884. Cetere, Klara estis la unua persono, al kiu Zamenhof parolis pri sia afero post kvin kaj duona universitataj jaroj. Ilia fianĉiĝo okazis en la printempo de 1887, kaj la edziĝo samjare en aŭgusto. Post la edziĝo Klara fariĝis la „ĉiama kunlaboranto kaj helpanto de la edzo, (kaj) ofte plenumis liajn administrajn kaj sekretariajn taskojn." Ĉio indikas, ke tre frue, eble ekde la unua intervidiĝo, Klara Silbernik sciis pri Esperanto kaj entuziasmiĝis pri la ideo de internacia lingvo kaj la aliaj idealismaj okupiĝoj de la juna Ludoviko.

Laŭ unu el la fratoj de d-ro Zamenhof, Leono, Ludoviko komencis serĉi eldoniston por sia Esperanto-lernolibro jam en 1885, do la lingvo estis preta en tiu jaro. Sekve, Klara havis la okazon lerni Esperanton en ĝia definitiva formo antaŭ publikigo, se ni akceptas la renkontiĝan daton de 1884. Pri kio parolis la du geamantoj dum la tri jaroj antaŭ la edziĝo? Inter aliaj aferoj, ili certe pritraktis Esperanton. Cetere, estas kredeble, ke Zamenhof jam tiutempe komencis instrui la lingvon al sia estonta kunlaborantino. Eble, dum siaj vojaĝoj kiel juna kuracisto for de Varsovio, al Vejseje kaj Plock en 1885, kaj al Vieno en 1886, li sendis al Klara leterojn parte aŭ tute en Esperanto, kaj ŝi respondis en la lingvo, kiu servis por ligi ilin eĉ pli intime.

Sándor Rákos

Ludoj de Catullus

Fragmento

dek jarojn vi edzino mia estas
Lesbia ekde longe jam kvietas
en mi la ŝtorm' sovaĝa la eterna
tajdego de tiu ĵaluz' terura
ni vivas en kvieta domo
en rokpejzaĝo de Sabinum
kun domservistoj vi disputas
pri la bienoj mi diskutas
ceteraj zorgoj ne plu estas
la temposablo pigre fluas
la posttagmezoj longas monstre
pli longas la vesperoj mutaj
de la verando ni rigardas
ke la dormema grego venas
jam hejmen tra la polvonubo
dum la unua stel' ĉiele
ekvibras ankaŭ sube lampon
flamigas nia servistino
nin vokas frua vespermanĝo
la sombra monto lulas fumon
la ombra frondo merloneston
ekĉirpas griloj gazonmeze
kaj la kokinoj jam dormetas
dormetas ankaŭ la gardhundo
ankaŭ ni kun palpebroj pli kaj
pli pezaj sidas ĉe la fajro

kaj flirtaj bildoj hirtaj sonĝoj
fantomas ĉe okuloj-koroj
ni sonĝas ke ja estis Romo
estis Lesbia kaj Catullus
kiuj tre multe frenezumis
per kriso arda kis' venena
ili ja ludis ludon murdan
ili ja luktis lukton ardan
iaman fojon antaŭlonge
dormoze ni estingas fajron
kaj nin konservas por morgaŭo

El la hungara: Imre Szabó



PANORAMO

Festivalo de TV-filmoj

En la urbo Veszprém ankaŭ ĉijare oni aranĝis la jam tradician festivalon de televidaj filmoj. La zorge elektitaj filmoj konkursas antaŭ ĵurio el fakuloj, sed la konkurson povas sekvi ankaŭ la

Aluminio per japanaj maŝinoj

La mondmerkata prezo de la aluminio-krudaĵo resp. de la duonpretaj produktaĵoj havas malkreskan tendencon. Tial la produkta sistemo de la Malpezmetalurgia-uzino de Székesfehérvár estas transformata. Ĉijare jam kreskas la produktado de la pli altgrade prilaboritaj varoj. Tiun celon servas ankaŭ la ekfunkciigo de la japana maŝinaro produktanta aluminio-bendon.

Birdoprotektado fare de lernejanoj

Antaŭ sepdek jaroj fondiĝis en la hungaraj lernejoj la movado de birdoprotektado. Tiel la lernejanoj fariĝis la unuaj batalantoj de la naturprotektado. Vivas ankoraŭ pluraj el tiuj, kiuj ĝis nun observis la promeson subskribitan de majo en 1912. La prezo de la originala „membrokarto" servis la celojn de la Birdoprotekta Ligo. En la teksto – ankaŭ hodiaŭ imitinda – la infano promesas neniam ĉasi, peli, turmenti birdojn, ĝeni aŭ detrui nestojn. En apartaj alineoj estas denombritaj ankaŭ la diversaj dombestoj, etaj sovaĝbestoj, ranoj, skaraboj. Enhavas la promeso ankaŭ la ŝirmadon de arboj, arbetoj kaj ĉiuj kreskaĵoj. La seriozan, belan tekston kompilis siatempe la granda hungara natursciencullo Ottó Herman.

Hodiaŭ ĉiam pli multe da homoj klopodas en la semajnofinoj forlasi la dense loĝatajn terenojn kaj rifuĝi en arbarojn, al la libera naturo. Tre grava estas ilia sinteno al la flaŭro kaj faŭno. La Hungara Ornitologia Asocio okupas sin pri informa kaj propaganda laboroj, organizas kampanjojn por la protektataj birdoj inter lernejanoj kaj inter turistoj. Oni prilaboris eblecojn de la kunagado kun la Hungara Naturamika Asocio kaj kun la volontuloj de la Arbara Servo. La Ornitologia Asocio volus atingi tion, ke la turistoj vagadu en la arbaroj kun malfermitaj okuloj, atentu pri tio, kio endanĝerigas aŭ minacas la birdojn, la harmonian vivon de la naturo.

Por plezurigi filatelistojn

Hungara Poŝto eldonis serion de poŝtmarkoj omaĝe al la 25-jara jubileo de la spacesplorado. La serio prezentas la ĉefajn staciojn de la esplorado de la kosmo inter 1957 kaj 1982.

PANORAMO

tutlanda publiko, ĉar per la dua kanalo de la Hungara Televido estas spektebla la tuta programo de la festivalo. Tamen, tiu ĉi festivalo estas antaŭ ĉio faka evento: reĝisoroj, aktoroj, scenaristoj ktp. ĉi tie renkontiĝas por interŝanĝi spertojn – por la bono de la publiko.

Renkontiĝo de liutistoj

Fine de majo oni aranĝis la unuan internacian renkontiĝon de liutistoj en la parada salono de la fortikaĵo Nádasdy en la urbo Sárvár. Alvenis artistoj de tiu malnova instrumento el Svislando, Jugoslavio kaj Usono. La historia etoso de la parada salono bele harmoniis kun la kantoj el la 16-a jarcento, kiuj eksonis sur la kordoj de tiu bela instrumento.

Eklezioj por la paco

Ankaŭ la reprezentantoj de la hungaraj eklezioj partoprenis la Packonferencon de Mondreligioj, okazintan en Moskvo. La delegitaro post la reveno raportis pri la rezultoj de la farita laboro en gazetara konferenco, aranĝita de la Hungara Packonsilantaro. La gazetaran konferencon enkondukis s-ino Nándorné Sebestyén, prezidanto de la Hungara Packonsilantaro.

Svelto kaj stabilo

Tiuj du ecoj karakterizas la plej novan kaj eble plej belan Budapeŝtan ponton, la Ponton Elizabetan. Ĝi kunligas la centrajn partojn de la hungara ĉefurbo, situanta sur ambaŭ bordoj de Danubo. Kvankam la ponto estis konstruita antaŭ nur 18 jaroj, ĝi fariĝas iom post iom – kun Parlamentejo, Cenponto ktp. – unu el la simboloj de Budapeŝto.



Varia nutrado –
specialaj postuloj

KERIPAR

KAĈIGA MAŜINO

En ĉiuj grandaj kuirejoj kaj preparejoj de malvarmaj pladoj ĝi estas efika ilo por dispecigo de petroselo, aneto, apio kaj cepoj. En malgrandaj kuirejoj, ekz. en hoteloj, dietaj kuirejoj de hospitaloj, en nutro-centroj por infanoj ĝi estas multflanka maŝino ĉe kontentigo de specialaj postuloj. Nur ŝanĝante la funkcitempon inter 5 kaj 100 sekundoj oni povas uzi ĝin por diversaj celoj: dispecigi brasikon, okzalon, spinacon, mueli viandon kaj kaĉigi ĝin por pasteĉo. La maŝino dispecigas malmolan fromaĝon, kirlas kazeaĵon, preparas majonezon kaj spicitan majonezan saŭcon. La kaĉigon plenumas giranta serpotranĉil-paro. La sekuran funkciigon servas aŭtomata kovrilferma mekanismo.

Teknikaj indikoj:

Larĝo	300 mm
Alto	522 mm
Profundeco	385 mm
Pezo	25 kp
Nominala volumeno	6 litroj
Plenum-tempo	10-100 sek. (dependas de la prilaborata materialo kaj de ĝia moleco)
Funkciiga tensio	380/220 V, 50 Hz
Funkciiga povo	750 W

Produktas: Keripar, Budapest VI. Népköztársaság u. 43.
Telefono: 313-124
Telekso: 22-6237

Disvendas: MÜÁRT, Budapest VI. Rudas L. u. 18.
VOSZK, Budapest XI. Csiky G. u. 1.

REVUO DE REVUOJ

„De nia korespondanto" – estas legebla ofte en E-revuoj de la mondo ĉe la raportoj pri la internacia festivalo de E-teatroj, okazinta dum marto. La artikoloj, ĝenerale kun multaj bildoj, aludas al Budapeŝto en LA ESPERO, LITERATURA FOIRO, HEROLDO, samkiel ESPERANTO (ĉu listigi plu?) okupiĝis vaste pri tiu unika festo de nia kulturo. Kaj la unikeco altiris – rajte – *festan atenton* de niaj revuoj, ja neniam okazis io simila, prezentaĵoj de profesiaj trupoj en tia arta nivelo. Pliaj komentoj ne apartenas al mia devo, eble mi riskas nur ĵurnalistan rimarkon: post unu jaro, kiam tia plezuro-aro printempe denove estos ĝuebla sur la scenejoj, eble pli amplekse, tiam pli da „korespondantoj" kaj „antaŭvizitantoj" de la kongresurbo povos hejme raporti: Esperanta teatro, ludo kaj parolo kune, varmigis nian koron!

Pri sentimentoj estas ĉiam malfacile adekvate skribi: la vekitaj emocioj ne lasas sin trafe interpreti per vortoj. Nek kiam kortuŝa dramo sonas desur la scenejo en IL, nek kiam la Movado mem parolas pri siaj agoj kaj rezultoj. Legante la Estraran raporton de UEA en maja n-ro de ESPERANTO, la verdstelan koron levas ĝojigaj sukcesoj, kvankam modere enteksitaj en oficialan stilon „de paĝo al paĝo", kiel ekkrius entuziasme *Tárkony*. Sed mian devon apreci, mi provos igi iom pli facila: mi turnas vian atenton – nun – sole al la nombroj. Al la nediskuteblaj nombroj de la membraro. Al la kreskantaj, eĉ rekordaj nombroj. Malgraŭ la multaj obstakloj, jen: nia altirforto kreskas, konstante kreskas!

Jukas ankaŭ mia lango – kiel en HEROLDO (n-ro 8.) vokas A. *Vaitilaviĉius* kontraŭ kelkaj tro subjektivaj, tro naciismaj prilingvaj proponoj, kiuj estis – cetere de ne malgravaj personoj ne nur per-sonoj, sed per-literoj – lanĉitaj. Ŝanĝi nomojn, ekzemple, jam tradiciajn al Anglotero, Danmarko... por ne daŭrigi plu la *francmaniere* skulptitajn nomojn kaj la similradikajn ceterajn ideetojn. Oni ne miru do, se EL POPOLA ĈINIO (n-ro 4.) avertas pro E-a naturismo de Eŭropanoj, t.e. emo al formoj „naturaj" *por ili*, sed ne por aliaj. Verdire, eĉ se tre ofte aperas en nia sfero naciaj inklinoj de niaj multmeritaj francaj samideanoj, ankaŭ gefiloj de aliaj Eŭropaj nacioj *devas gardi sin* por ne enmiksi en E-on „internaciajn" vortojn laŭ siaj hejmaj formoj kaj sencoj. Anstataŭ ekz. „imperialismo" sufiĉas – laŭfundamente – „imperiismo", kaj eĉ pli bone, se nenia imperiismo penetrus en la Internacian Lingvon. Kiu deklaras vortformon de sia lingvo „internacia" sen kontentigaj pruvoj, tiu kaŝe ŝovas nacian vidmanieron, kaj perturbas la internacian, direktas nin al slangoj.

Ĝuste pro la multaj slangoj – aŭ variantoj – de la *angla* lingvo konsideras profesoro *Pordány* en MONDO KAJ LINGVO (n-ro 3. de tiu hungarlingva E-revuo) neefektivigebla la strebon fari la anglan internacia lingvo. Li montras, kiel kreiĝis en diversaj mondpartoj kvazaŭ *apartaj*, iom specifaj anglo-variantoj, kiel Sud-Afriko, havas propran „anglon" samkiel Puerto Rico aŭ Hindio. La „standard aŭ Kings English" estas proprajo eĉ sur la Britaj insuloj nur de kelkaj milionoj. Ankaŭ ni ne rajtas forgesi la historian instruon: ni ne bezonos „superdialekton" apud slangoj en Eo! Iel simila estas la timo de Nederlandanoj, pri kio eblas legi en KOMUNA E-GAZETO (5.) pri la kampanjo de laboristo-esperantistoj kontraŭ deviga plivastigo de la angla en la baza instruado. La ĉefa argumento (kaŭzo de la kampanjo) estas la *malfavoraj konsekvencoj por la Nederlandaj* lingvo kaj kulturo. Sub premo de la (Usona)-angla, la malgranda parenco, la Nederlanda, povos nur suferi, pro nehaltigebla penetro de anglaj vortoj kaj esprimoj. Tiu fenomeno cetere estas tre bone konata de la lingvistiko, aparte bone en Anglio, kie iam la Romia koloniigo lasis tiom da lingvaj spuroj, de- aŭ aliformante la lingvon de la loĝantaro. Jam ŝajnas, ke tiu kampanjo por la nacia intereso vekis grandan atenton ĉe la instruistoj kaj la gazetaro.

Okpaĝa, ankoraŭ modesta estas la E-suplemento de SOVETA UZBEKISTANO, kolorplena grandformata revuo de la Mez-Azia respubliko. Post ne tro granda internacia kampanjo, la eldonisto akceptis la multflanke venintajn dezirojn kaj aldonas E-an tradukon de la revu-artikoloj. La Taŝkentaj esperantistoj vere meritas pluan apogon el Eŭropo por firmigi ankaŭ per tiu ĉi rimedo la jam fortan E-bazon en Azio.

Kio plaĉis ankoraŭ en niaj revuoj? En LITERATURA FOIRO (72.) la vojmontra demonstracio de Claude *Piron* pri la ĝenerala taŭgeco de Eo por vera traduko de kantoj. Jes, eblas tiel fidele traduki per Eo, kiel per aliaj lingvoj nur malofte – kaj kunsonante kun la muziko. – En INTERNACIISTO (52.) la malkaŝaj raportoj el Salvadoro, Hindio kaj aliaj landoj; la artikolo pri varioplenaj vojoj al socialismo. – Parte reeĥas en KONTAKTO (71.) la energio-problemoj en la samaj landoj, la rigardo malantaŭ la kurtenon internen en la Mez-Orientaj „naftoriĉaj" landoj helpe de R. *Corsetti*. – Kaj ĉiam igas admiri la heroa persisto de la bulgaraj e-istoj dum la feliĉe forpasintaj jardekoj de la faŝismo, la ofte kruelaj persekutoj, kiujn en la 20-aj, 30-aj jaroj iliaj asocio kaj redakcioj, kursanoj, membroj kaj funkciuloj devis elteni. BULGARA E-ISTO prave prezentas detalajn rememorojn pri tiu pasinto: ili pruvas grandiozecon de la E-movado.

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ferenc László

Kiel renaskiĝas la lago Velencei?

Unu el inter la gravaj lokoj kie oni luktas en Hungario por gardi kaj protekti la naturon, estas la Lago Velencei kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Kaj ni tuj menciu, ke tiu lukto ne montriĝis vana. La rezultoj konvinke pruvis, ke la medioprotektaj transformoj estis laŭcele, konvene planitaj. Aparte favora estas la ampleksigo de la ripozado en plena akordo kun la medioprotekto, kun samtempa plibonigo de la akvokvalito kaj plibeligo de la ĉirkaŭaĵo.

Samkiel multaj lagoj sur nia Tero, ankaŭ la Lago Velencei – situanta inter Budapeŝto kaj Balatono – maljuniĝis. Tion kaŭzis mem la naturo, ĝis tia grado, ke nun la homo devas jam interveni por ĝin resanigi de la troa sedimentiĝo kaj ŝlimiĝo kaj de ties malagrablaj sekvoj en la vivo de la lago. Vastaj kaj detalaj ekzamenoj antaŭis la rejunigan programon, kiu montriĝis ĝis nun vere bonefika. Tio estas atribuebla plejparte al la integra vidmaniero de la programo, al la sin kompletiganta ĉeno de ĝisfunde pripensitaj medioprotektaj disponoj. Evidentiĝis el multaj spertoj, ke nur per ekologia vidmaniero eblas eviti nekompletajn sekvaĵojn de opaj protektaj disponoj, kiuj senkonsidere al la komplekseco de la naturo, malkapablas alporti la deziratan rezulton, eĉ kaŭzas pluajn damaĝojn.

La urĝan intervenon en la vivon de la lago aparte lanĉis la rapide kreskantaj bezonoj koncerne ripozadon kaj sportojn. En Hungario la Lago Velencei prezentas ja – post Balatono – tiurilate la plej vastajn eblojn, do ĝia graveco estas ege granda. Ĝia altirforto lastatempe rapide kreskis, ĉar la rava pejzaĝo, la konsisto de la akvo, la velura plaĝo, la favora klimato, la vasta akvosurfaco (necesa por kelkaj akvaj sportoj), krome la proksimeco al la ĉefurbo, pli kaj pli levis la intereson de la publiko.

Kvankam la avantaĝoj de la lago estis jam delonge konataj, ĝis la mezo de nia jarcento malmulto okazis por la publika utiligo. Antaŭ duonjarcento tiel devis plendi ĵurnalisto:

„Tre malmultas kion homa laboro kreis ĉirkaŭ la lago. La bordon neniu reguligis, la fundo de l' lago ne estas purigita, mankas ampleksaj, modernaj hoteloj, ŝipoj, ne ekzistas akvoduktoj kaj kanalizado, nek parkoj, promenejoj, eĉ la elektra lumigo funkcias nur sur triono de la laga periferio."

Vane sopiris je ŝanĝoj la tiama kronikisto, apenaŭ okazis io bonvena. La nuntempa kronikisto certe troviĝas en pli feliĉa situacio, jam li povas registri abunde da ŝanĝoj, precipe dum la lasta kvaronjarcento, koncerne la lagon, ĝian renaskiĝon. Sed antaŭ la prezentotaj programo kaj rezultoj ni ekkonu iomete la lagon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon.

Pri la lago

Desur montetoj ĉe la okcidenta bordo la panoramo de la lago ŝajnas mirinda. La 27 km^2 da surfaco jen brilas de la sunradio, jen malhelas laŭ pitoreska desegno de kanokampoj kaj interakvoj, kie krozadas ŝipoj kaj velboatoj. La akvo ĝenerale profundas nur 2 m-jn, sed ie kaj tie 3-4 metrojn, sekve ĝi rapide varmiĝas. La alta granitbloko norde (Meleghegy, 352 m) en sunbrilo iĝas tre varma, kaj de tie kons-

Kano-insuloj en la Lago Velencei





Hidromekanika forigo de ŝlimo el la lago

tante ventas-venas varma aero super la lagon, al la banlokoj. La Suno brilas 2000-2100 horojn jare.

La kemia konsisto de la akvo igas ĝin terapie efika, i.a. kontraŭ haŭtmalsanoj; sanigaj efikoj prezentas sin ankaŭ ĉe reŭmatismoj, klimakteraj ĝenoj, kronikaj virinaj inflamoj. La granda proporcio de magnezio-ionoj kvietigas la nervojn, precipe saniga estas la laga ŝlimo (grandparte el fajna sablo), uzebla por ŝlimterapio. Estas do kompreneble, kial kuracistoj rekomendas terapion kompletigan banon en la lago okaze de korpa-spirita trostreĉiĝo, anemonio, metabolaj disfunkcioj kaj dum resaniĝo. Jen la faktoroj, kiuj igas la lagon tre konvena por banado, ripozado kaj por multaj akvaj sportoj.

La kanokampoj kaj kan-insuloj vivigas variajn vegetaĵon kaj animalaron. Pro la originala, abunda birdaro estas ŝtate protektata la suda parto de la lago (kune kun la najbara lageto Nádas). El la tiea ornitologia observejo en- kaj eksterlandaj fakuloj esploras la pratipan lagan mondon, la sekretojn de la kanejoj.

Ankaŭ la subakva vivo estas rimarkinda, ja la Lago Velencei apartenas nun ankaŭ al la fiŝkaptistoj, kaj ilia asocio intencas kiel eble restarigi la praajn cirkonstancojn. Amase vivas en la lago sandroj, abundas diversaj karpospecoj, ezokoj, bramoj, eĉ oni kaptas da maloftaj fiŝospecoj. Do la fiŝaro estas eminenta kaj kvalite, kaj kvante, konvena por sporta fiŝkaptado.

La neglektita, parte praa situacio de la lago dum la lasta jardeko multe transformiĝis pro ampleksaj hidrologiaj kaj terenon formantaj laboroj. Antaŭ plaĝoj oni likvidis la kanejojn, la bordojn ŝirmas digoj, kaj interne de la lago daŭre laboras fragŝipoj kiuj forigas la molan sedimenton por adapti novajn areojn cele de ripozado. Malantaŭ digoj la forigita ŝlimo plenigas areojn, kie oni konstruas novajn plaĝojn, garaĝojn por boatoj, pavilonojn por restoracioj kaj vendejoj.

Rigardo en la pasinton

Tiu ĉi speca lago kreiĝis antaŭ nur 20-30 mil jaroj. Baldaŭ ekloĝis tie la homoj de la ŝtonepoko. La abundeco de fiŝoj kaj bestoj igis la ĉirkaŭaĵon (precipe la montetojn) tre oportuna por niaj prauloj. El la bronzepoko estis trovitaj restaĵoj de kabanoj, de tutaj vilaĝoj, kun ĉiuj iloj, kiuj estis necesaj por ĉasistoj-fiŝistoj. Preskaŭ ĉiuloke ĉirkaŭ la lago estis trovitaj ceramikaĵoj, iloj el bronzo kaj osto, same juveloj, ofte el konkoj. El osto ili fabrikis harpunojn por ĉasi akvajn bestojn. El la kuproepoko, de antaŭ 4 mil jaroj restis ornamitaj pladoj en iamaj loĝlokoj kaj tombejoj ĉe pluraj lokoj. Laŭ la abundaj trovaĵoj eblas sekvi la progreson kaj ŝanĝiĝojn de popoloj antaŭ jarmiloj.

Laboras la dragmaŝino





Boathavenoj, Agárd

Dum la granda popolmigrado la kirlado de la alvenintaj kaj formigrintaj homgrupoj estas same pruvebla laŭ la urnoj kaj potoj trovitaj ofte en iliaj tombejoj. Iliroj, Keltoj kaj aliaj popoloj miksiĝis apud la lago, kiu komence de nia erao iĝis Romia provinco, Panonio. La nova potenco firmigis pacajn cirkonstancojn ankaŭ apud la lago. Grava militvojo estis konstruita de *Aquincum* (Norda Buda) tra *Savaria* (nun urbo Szombathely) al Italio, kiu tuŝis ankaŭ la nordan bordon de la lago. La nunaj vilaĝoj *Pákozd* kaj *Sukoró* etendiĝas preter tiu militvojo. Surloke de la vilaĝo *Velence* ni konas la iaman Romian urbeton *Floriana*, de kiu postrestis interalie eroj de rajdstatuo, laŭ la riĉe ornamite vesto probable de imperiestro. Skulptitaj tomboŝtonoj, monumentoj atestas pri la ekonomia graveco de tiu urbeto de eraviskoj (Keltaj bredistoj). Ni menciu ankaŭ la Romian digon apud *Pátka*, ankaŭ iama Romia vilaĝo. Ĝi servis verŝajne ĉe akvorezervujo, kaj estas videbla ankaŭ nuntempe.

Komence de la 10a j.c. jam hungaroj loĝis ĉe la lago. Dokumentoj pruvas, ke la suda bordo apartenis al la reganta familio. Pluraj vilaĝoj en la ĉirkaŭaĵo de la lago gardas ĝis nun la nomojn de tiamaj estroj de gentoj kaj triboj (Kápolnásnyék, Csákvár, Baracska, Puszta-szabolcs k.a.). Ĉar sude de la lago *Székesfehérvár* iĝis baldaŭ rezidejo de la regnestro, la grava vojo de tie al Buda prosperigis ankaŭ la ĉirkaŭaĵon de la lago.

Meze de la 16a jc. la turka okupo igis la tie loĝantojn fuĝi en marĉojn kaj arbarojn. Nur fine de la 17a jc., post forigo de la turkoj, densiĝis denove la popolo ĉeborde, kiu rekreis baldaŭ plurajn el la iamaj vilaĝoj. La vilaĝo *Velence* ricevis sian nomon de la multe uzita *ventoflago*, necesa ilo de la iamaj fiŝistoj por orienti sin sur la lago: ĝia malnova hungara nomo estis *velence*.

La loĝantaro apud la lago nur malrapide kreskis. Antaŭ duonjarcento la popolnombrado registris en la apudaj vilaĝoj kaj farmoj apenaŭ pli ol 8 mil loĝantojn, sed jam plurcentojn da vilaoj de ripozemuloj. Post la unua mondmilito venis la unuaj somerumantoj, kaj post 1930 ili jam organizis kelkloke siajn societojn por akiri iom da prospero koncerne la bankulturon. La registaro deklaris baldaŭ „refreŝiĝejo" la sudan bordon de la lago, sekve oni konstruis garaĝojn por boatoj, plaĝojn sur la sabla bordo, kaj komenciĝis nova epoko ĉirkaŭ la vilaĝo Velence.

La ekflorado

Nuntempe jam nombras pli ol 10 mil la diversgrandaj, plej ofte ĉarmaj domoj kaj dometoj de la somere aŭ semajnfine tie ripozantaj familioj kaj de entreprenoj. En 1958 oni organizis apartan oficialan Komisionon de Lago Velencei, kies laŭplana kaj multflanka laboro multe disvolvis la cirkonstancojn. Ankaŭ la hidrologiaj instancoj grave partoprenis: apud la tuta suda bordo oni aranĝis la bordzonon, ĝia nivelo estis altigita kaj firmaj remparoj konstruataj. Ekfunkciis la regiona akvoprovizejo, kiu ebligas al la ripozanta publiko pli agrable ĝui la ferion en civilizita medio. Samtempe estis farita ankaŭ kanalizacia reto.

Ĉe *Agárd* estis konstruita boathavenoj por 200 boatoj, ankaŭ por

velboatoj, krome ŝiphaveno por la laŭlinie trafikantaj motorŝipoj, ĉiuj kun baseno kaj ŝirma moleo. Paralele konstruiĝis garaĝoj por boatoj kaj akvaj sportejoj. En 1970 jam cento da ripozejoj de entreprenoj akceptis preskaŭ du mil gastojn. La unua hotelo, „Touring" malfermis tiutempe la pordojn, samtempe ekfunkciis kampadejo, magazeno kaj pligrandigita poŝtoficejo kun telefoncentralo. Ilin bezonis jam la pli ol 1500 privataj somerdomoj.

La kompleksan, longtempan programon de disvolvo por la Lago Velencei la registaro aprobis en 1971, tiel kreante tiucele kadron por 20 jaroj, ĝis 1990. Ĝia celo estas rapide efektivigi la regionan programon de disvolvo, por ke la borda zono kaj la ĉirkaŭaĵo prosperu en akordo kun la kreskanta turismo. Laŭ la programo estis ampleksigitaj la terenoj servantaj por la privataj somerdomoj. La plej grava celo estas krei por la organizata ripozado, krome por la akvaj sportoj, pliajn bazojn, tiel daŭre levante la nivelon de ripozebloj ĉe la Lago Velencei. Tio havas tutlandan, eĉ internacian signifon, do ne nur por Budapeŝto kaj Székesfehérvár, ĉar pro la preteranta aŭtovojo la lago prezentas gravan haltejon por la internacia kaj enlanda turismo, ankaŭ kiel vojaĝcelo. La lago servas ankaŭ kiel tutlanda bazo por akvaj sportoj kaj por junularaj feriejoj.

La programo kalkulas post 1985 pli ol 30 mil konstantajn loĝantojn ĉe la bordo, krome somere pliajn 65 mil sezonajn loĝantojn. Ankaŭ semajnfine alvenados verŝajne pli ol 40 mil personoj. Oni devos do zorgi por tiu homamaso pri ripozo, provizado kaj distro sur alta nivelo. Tiucele la programo klopodas etendi kaj ampleksigi la uzeblajn areojn por tiel moderigi la nun jam prezentiĝantan semajnfinan ŝarĝon sur la suda-bordaj lokoj. Tion faciligos, ke post la reguligo de la tuta bordzono, la Lagon Velencei ĉirkaŭos aleoj kaj promenejoj, boskoj kaj parkoj kun plaĝoj. Ties realigo jam komenciĝis.

La planataj novaj plaĝoj amplek- 110 mil gastojn samtempe, kun bone



Konforma al la pejzaĝo estas la domo de la Laga Inspektejo

ekipitaj instalaĵoj. Krom tiuj sur multaj lokoj ĉirkaŭ la lago oni provizas ĉe la bordo, do apud la akvo, areojn por la organizita refreŝiĝo, ekzemple por plurcelaj ripozejoj kaj instruejoj de entreprenoj, krome akvosportejoj, fiŝkaptistejoj, kampadejoj, tendaroj de junpioniroj kaj junuloj.

La ĝisnunaj rezultoj

La bazon de la disvolvo ĉe la Lago Velencei kreis grandaj hidrologiaj laboroj dum la 60-aj jaroj: reguligo de la laga nivelo, konstruo de borda remparo, krome la disvolvo de komunaj servoj. Du grandaj rezervujoj estis

Antaŭ la starto kolektiĝas la velboatoj

konstruitaj por la plej grava enfluanta rivereto *Császár:* la unua kapablas akcepti 8 milionojn da m^3, la pli granda ĉ. 9 milionojn da m^3, kaj per tiuj akvoamasoj estis kontentige stabiligita la freŝiga cirkulado de la lago. La amplekson de la laboroj montras, ke por la dua oni devis movi 660 mil m^3 da tero kaj enigi pli ol 5 mil m^3 da betono. Aldone oni ĝustigis en sia tuta longo la fluujon de tiu ĉi rivereto kaj ampleksigis la defluigan kanalon de la lago. La du artefaritaj rezervujoj kapablas rezervi preskaŭ la duonon de la averaĝa akvoamaso de la Lago Velencei, do eĉ okaze de seka vetero eblas malhelpi la malaltiĝon de la akvonivelo. Se foje venas superakvo, ties grandan parton la du rezervujoj povas akcepti. Se eventuale la Lago Velencei minacas elflui kaj subakvigi la sudan bordon, tion malhelpas kvazaŭ savoklapo la modernigita defluiga kanalo, kies tralaso-kapaciton oni vastigis de 1,5 al 4,5 m^3/sek.

Daŭras la prikonstruado de la bordzono. El la planita 25 km longa, bordon ŝirmanta remparo 9 km jam pretas, el la fundo de la lago oni dragante forigis ĉ. 3 milionojn m^3 da ŝlimo kaj altigis surborde 130 hektarojn.

Jam la ĝis nun efektivitaj laboroj, la reguligo de la akvonivelo kaj lagujo, la prikonstruado de la bordo, la ekstermo de kanejoj kaj fukoj, kontribuis al pli vigla vivo ĉe la lago. Tiuj laboroj ebligis gastigi pluajn amasojn de ripozantoj kaj bangastoj, oni povis ampleksigi kaj modernigi la jam ekzistantajn plaĝojn kaj konstrui novajn akvosportejojn. Per ampleksigo de plaĝoj tiuj povas akcepti pliajn dek mil banantojn, kaj tiel la banejoj de la suda bordo povas samtempe plezurigi 20 mil banantojn. Nur sur la bordo de Agárd la preskaŭ kilometron longa nova Park-plaĝo en ok kajut-pavilonoj nun prezentas lokon por ses mil bangastoj. En ĝia proksimeco estis konstruitaj en kadro de nova akvosportbazo instru-basenoj por remantoj kaj naĝantoj, halo por gimnastiko, konkurejoj, klubejo, ankaŭ moderna sporthotelo. Ĉio ĉi bone servos la velboatklubojn, la asociojn de kajak- kaj kanuo-sportistoj. Tie ĉi estas la hejmo ankaŭ de akvosportlernejo, kaj kompreneble la bazo devas servi la korpan edukon de lernejaj infanoj de la laga regiono.

Baseno en la kloakakvo-purigejo de Agárd

En kadro de la vasta ĝustigo de l' bordo venis ebleco zorgi pri la ĝis tiam parte neglektita norda bordo. Ĉe Velence oni komencis konstrui aparte por aŭtomobilistoj plaĝon kaj vendejan halon, ankaŭ konkurejon por remistoj kaj kajak-kanuo-sportistoj laŭ internaciaj konkur-normoj. El la grandioza junulara feriocentro la kerna tendaro estas jam delonge preta – kvincent junuloj ĝuas samtempe la ferion tie ĉi en lignaj domoj. Kiam la junulara feriocentro estos preta, en ĝi havos lokon samtempe kvin mil junuloj por ricevi somere kaj dum aliaj feriotagoj la multajn plezurojn de la Lago Velencei.

Pere de la menciitaj hidrologiaj laboroj – nivelaltigo de bordaj areoj, likvido de kanejoj kaj enakvaj herbaĉoj – preskaŭ la tuta lagbordo iĝis libera disde la multaj etaj privataj parceloj, etendiĝintaj ĝenerale ĝis la akvo. Tiuj obstakloj nun jam ne ĝenas la publikon, kiu volas senpere atingi la akvon de la lago. Kompreneble oni devis tiucele kelkloke eksproprietigi iom da areo por la publika utilo, aliloke forigi senpermese konstruitajn kabanojn kaj domaĉojn. Tiamaniere favore transformiĝis la antaŭa plenŝtopita aspekto de la suda bordo. Intertempe komenciĝis jam la aranĝado de la norda bordo, estas konstruataj la publike bezonataj instalaĵoj. Sur kalvaj flankoj sur montetoj, bordaj areoj estis plantitaj arboj: ĝis nun proksimume sepcent hektaroj da novaj arbaroj kaj parkoj troviĝas ĉirkaŭ la lago.

Rapide disvolviĝis la publikaj servoj, precipe la provizado per elektra energio. Konstruiĝis grandkapacita transformatoro, plilongiĝis la altfrekvencaj kaj vilaĝaj elektraj linioj, tamen eĉ tiel ili ankoraŭ ne povas kontentigi la kreskantajn bezonojn. La vojoj de la regiono iĝis pli modernaj, perfektiĝis la ĉefvojo de la suda bordo, al kiu aldoniĝis ceteraj vojoj en longeco de 65 km. Kompreneble ankaŭ interne de la vilaĝoj oni aranĝis la stratojn, ĉie oni konstruis trotuarojn, plantis arbojn kaj boskojn por krei aleojn, ktp. Nur dum la lasta kvinjaro oni elspezis miliardon da forintoj por aranĝi la terenojn, konstrui duktojn kaj vojojn.

Kiel estas videble el la supra skizo, oni metis en fokuson de la disvolvo

ĉe la Lago Velencei la reguligon de la lago kaj la kompletigon de la ĝis tiam preterlasita „infrastrukturo". Tiun fokusigon motivis la bezono por fundamenti la pluan progreson en la regiono. Jam nun, la atingita nivelo forte levis la altirforton de la Lago Velencei, kaj ankaŭ levis la akceptan kapablon de tiu granda ripozejo. En 1971 entute 15 mil gastoj povis ricevi tranoktejon apud la lago. En hoteloj, kampadejoj kaj ripozdomoj de entreprenoj estis du mil litoj, en privataj domoj 12 mil, kaj en tendaroj 1500 litoj estis registritaj. Ĝis 1975 la supra nombro kreskis proksimume per sep miloj, precipe en privataj ripozdomoj, parte pere de la junulara feriocentro kaj pere de ampleksigo de la kampadejo de Agárd. Tiel la nombro de la ripozantoj ĉe la lago kreskis ĝis 25 mil, tiu de la semajnfine ekskursantoj kaj banantoj ĝis 18 mil.

Depost tiam, do dum la pasintaj kvin jaroj, novaj sportinstalaĵoj prosperigis la sportan vivon sur la lagobordo. Precipe disvolviĝis la akvosportojn servantaj instalaĵoj. Entreprenoj konstruis novajn boatgaraĝojn, jam funkcias en Agárd la akvosportbazo kaj la sporthotelo. Sur la suda bordo estis kreitaj novaj boathavenoj, ankaŭ hejmoj por fiŝkaptistoj. Tutlonge de la bordo, precipe sur la plaĝoj, viciĝas multaj pilkludejoj kaj alispecaj konkurejoj, en la tendaroj de junularo eĉ kompletaj sportejoj.

Ĉe la norda bordo oni uzas jam la novan 2200 m longan konkurejon de remboatoj. Meze de la lago dragŝipoj profundigis la konkurejon por la velboatoj. Sekve de tiaj favoraj cirkonstancoj la velado ekprosperis — tion helpis ankaŭ la akvosport-lernejo —, kaj forte firmiĝis la sportado per remboatoj, kajakoj kaj kanuoj. De pluraj jaroj sur la Lago Velencei oni aranĝas altnivelajn konkurojn. La someran sezonon inaŭguras soleno de „ekvelado", kion sekvas sezono de konkuroj kun multaj eventoj. Vintre la lago plene glaciiĝas, kaj sur la glaciebeno oni denove veladas per tiucelaj glitveturiletoj, kiuj prezentas eksterordinare buntan bildon al la spektantoj.



Aerfoto pri la ŝiphaveno de Agárd

Kluzo sur la defluiga kanalo Dinnyés-Kajtor

Se ni jam alvenis al la vintra sezono, estu menciita la nova termalbanejo de Agárd, kiun provizas 52 C grada varmfonto. La vintre venantaj *banantoj* naĝos en la konstruata naĝhalo, ankaŭ sidos en la ampleksa varma baseno — aŭtune de 1983 la publiko jam povos viziti ilin.

La supraj faktoj montras iom skize al la leganto, ke la ideoj pri rejunigo de la lago pruviĝis ĝustaj. La plena realigo de la programo vere ebligos, ke la renaskiĝanta Lago Velencei fariĝu hejmo stabila por la ripozi, somerumi aŭ ekskursi dezirantoj, konvena bazo por la akvosportoj. La lago do akiris vere esperplenan venonton!

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*



Eldonejo *Műszaki* ofertas al la estimataj legantoj kaj fakuloj la subajn librojn en la hungara lingvo, necesajn por studado, ampleksigo de la konoj, kaj por la ĉiutaga laboro:

Barnabás Bárczy: Diferencialaj kalkuloj
28,- Ft

Barnabás Bárczy: Integralaj kalkuloj
36,- Ft

I.N. Bronstein – K.A. Semendjaev: Matematika poŝlibro
90,- Ft

d-ro László Zsombory: Lernolibro de la Trafika Kodo (KRESZ)
30,- Ft

Ervin Keller – Alajos Kalivoda – László Menczer: Ekzercoj por la ellerno de trafikreguloj
48,- Ft

Ervin Kovács: La tornisto
(Industria Faklibraro) 45,- Ft

László Kovács: Poŝlibro de teknikistoj
89,- Ft

Vilmos Milley – István Völgyes: Centra hejtado I-II.
(Industria Faklibraro) 62,- Ft

Gyula Obádovics J.: Matematiko
80,- Ft

Károly Opitzer (ĉefred.): Muntado de duktoj akva, kanalizacia kaj gasa I-II.
(Industria Faklibraro) 94,- Ft

György Rábel: Poŝlibro de maŝinfakaj teknologiistoj
91,- Ft

Zoltán Ternai: Lernolibro pri aŭtomobila tekniko

La Eldonejo *Műszaki konvene al la pretendoj de la legantoj daŭre reeldonas la suprajn librojn.*

Ili konstante estas aĉeteblaj:

en Budapeŝto en la vendejoj de Ŝtata Librokomerca Entrepreno, en provinco en la vendejoj de la Librokomerca Entrepreno Klera Popolo kaj en tiuj de Kooperativa Librokomerca Entrepreno.

Mendojn oni sendu al:

Eldonejo *Műszaki*
Budapest I. 1014
Szentháromság tér 1.

ELDONEJO MŰSZAKI

György Moldova

Arrivederci, Budapest!*



György *Moldova* (1934–) debutis kiel prozisto meze de la kvindekaj jaroj, sed lia verkista profilo konturiĝis nur jardekon poste. Li rikoltis la plej grandan sukceson kiel satiristo: en siaj verkoj li kritikas la misaĵojn sperteblajn en la socialisma socio. Li verkis ankaŭ plurajn literaturajn sociografiojn, en kiuj surbaze de detalaj esploroj kaj ampleksa faktaro li raportas pri la situacio de diversaj socitavoloj. La ĉi-suban novelon ni ĉerpas – kun la afabla permeso de la Eldonejo Corvina – el la nova eldono de *Hungara Antologio*, aperonta somere de 1983.

– He, paĉjo, jen tiu Fontana di Trevi, vi scias, la fontano Trevi – diris Benedetto Glavina. La maljunulo, Aladaro Glavina, veninte vizite al sia filo el Budapeŝto, ĉirkaŭrigardis:

– Kiom da sencerbuloj, filo; sian monon ili ŝutas en la akvon.

– Ej, paĉjo, ĉu vi ne konas la legendon pri la fontano Trevi?

– Se mi okupiĝus pri legendoj, mi ne scias, per kiu mono mi edukus vin je Benedetto*? Vi plu restus „Ts, Beĉjo" en Budapeŝto, por nuraj mil tricent kvindek forintoj monate.*

– Kiu ĵetas moneron en la fontanon, laŭ la legendo revenos Romon. Arrivederci, Roma!

– Kaj al kiu apartenas la mono?

– Al neniu.

– Interese.

Aladaro Glavina, reveninte Budapeŝton, vizitis deponejon de la Ŝtata Rub-utiliga Entrepreno, li elektis el la rubaro dek lavabaĉojn kaj saman kvanton da feraj kradoj.

La estro mire demandis:

– Por kio vi bezonas tion?

– Tio ne koncernas vin. Temas pri ideego.

La lavabojn li instalis en dek diversaj nodoj de la ĉefurbo: ĉe la Fiŝkaptista Bastiono, Popolstadiono, antaŭ la Porvaluta Vendejo kaj ĉe la Budapeŝta pulbazaro en la strato Eĉeri: li alfiksis po unu kradon, ŝloseblan per du pendoseruroj. Super la lavujojn li metis grandajn tabulojn kun surskribo „Fontana di Krevi – Arrivederci, Budapest! "

Post semajno li travizitis ĉiujn lavabojn; kun plena kontento li konstatis, ke mono abundis en ĉiu el ili; li trovis ne nur forintojn, sed ankaŭ eksterlandajn valutojn, kiujn enfetis turistoj, kortuŝitaj de la beleco de nia ĉefurbo. Troviĝis svisaj frankoj kaj jugoslaviaj dinaroj same.

Entuziasma pro la sukceso, li instalis pliajn lavabojn. Sur iu pli luksa li eĉ skribis: „Arrivederci, Budapest! Nur por internacie ŝanĝeblaj valutoj." Ĉi tiu fontano diferencis disde la ceteraj ankaŭ per tio, ke la maljuna Glavina, se okaze li ĉeestis la monŝutadon fare de eksterlandanoj, prezentis la iaman kafejan kanzonon „Sinjorino Klein, nu diru, kiu estas via tajlorino? " La eksterlandanoj kredis ĝin madjara popolkanto, do ili aplaŭdis entuziasme.

Ne estas mirinde, ke lia burso baldaŭ pufiĝis. Li aĉetis po unu vilaon en montaro, ĉe Danubo kaj ĉe Balatono, kun po unu televidilo; estis ja parto de liaj komfortamo kaj kleriĝemo sidiĝi ĉiutage antaŭ la aparato kaj ne ŝalti ĝin.

Glavina ne ŝakris valutojn; elakviginte la monakumulafon, li ĉiam aperis ĉe la Nacia Banko. Li vizitis ĉiufoje alian filion, tamen iu fervora oficisto adiciis liajn monŝanĝojn; evidentiĝis, ke li sola liveras pli multe da valuto ol la tutlanda teks-industrio. La raporto atingis la aŭtoritatulojn, kiuj tuj aranĝis laŭcelan taktikan interkonsiliĝon.

– Ĉu tiu povas daŭri, kamaradoj? Ne, tio ne estas permesebla plu. Tian gajnigan entreprenon ni ne povas lasi ĉe privatulo.

Post monato en la kadro de Supera Instanco pri Akvomastrumado estis fondita la Ŝtata Entrepreno „Adalberto Loĝingero" por Utiligo de Trevi-Fontanoj: ĝi tuj komencis sisteman organizadon kaj pluan vastigadon de la Trevi-fontanaro.

Estis evidente, ke la entrepreno ne povas riski sian reputacion per la lavabaĉoj de la maljuna Glavina. Kun

* Ĝis revido (italaĵo)

partopreno de renomaj projektistoj oni anoncis la fontankonkurson Trevi por kreado de artaĵo kun formo moderna, samtempe esprimanta la nacian karakteron kaj socialisman enhavon de la fontanoj.

La unua, dua kaj tria premioj – konforme al la regularo de la konkurso – ne estis aljuĝitaj; la unuan gratulon kun laŭdaj ŝultrofrapadoj gajnis Deziderio Otokaro Skrapač; finfine estis akceptita lia konkursaĵo. La moderna fontano Trevi prezentis azenon, frapegantan la kapon de paŝtisto, kvazaŭ simbolante, ke la subpremataj klasoj plimalpli frue venĝos al siaj ekspluatantoj.

Tiu alegoria skulptaĵo estis reproduktita en ducentmil ekzempleroj. Por la azenoreloj oni bezonis importi – kontraŭ internacie ŝanĝebla valuto, memkompreneble – specialan, frostorezistan gipson el Svisujo, sed la kompetentuloj estis konvinkitaj, ke tiu elspezo abunde regajniĝos.

La Ŝtata Entrepreno „Adalberto Loĝingero" por Utiligo de Trevi-Fontanoj komence havis ne pli ol kvarcentmil dungitojn. Personaro de ajna Trevi-fontano konsistis proksimume el: fontanestro, vic-fontanestro, ĉefa librotenisto, tri vic-ĉef-librotenistoj, kasisto, ordestro, du ordokontrolistoj, plotono da fontangardistoj, reklamisto, oficisto tenanta la kontakton kun la Akvomastruma Entrepreno, ĉefdungistino, elektita – kontraste al la tutlanda praktiko – el la edzinoj de la gvidaj funkciuloj; fine helplaboristo, kiu en la ĉeesto de la gvidantaro eligas la monon kaj purigas la fontanon. Pli poste por fontanoj ĉe fabrikoj kaj agrikulturaj kooperativoj oni dungis ankaŭ manipulistojn kun kurtaĝo, en sekundara posteno.

Krankam la priskribita organizo estis preskaŭ perfekta, la gajno de eksterlanda valuto kaj cetera mono ne superis la iamajn privatsektorajn enspezojn de la maljuna Glavina. Province, por ekzemplo, en la Trevi-fontanojn kun surskribo „Arrivederci, Budapest! " jetadis siajn forintojn nur instruistoj kaj fakuloj, delokitaj el sia Budapeŝta posteno.

Venis la tempo de la propagandistoj; por akceli la malintensan negocon, ili lanĉadis ideojn en rapida sinsekvo. Ĉiu mila eksterlanda monerfetinto ricevis miniaturan muzikantan Trevi-fontanon, kaj alrajdanta dungito de la entrepreno, vestita per ŝultropeltaĵo kaj popola tolpantalono, transdonis al li ledan diplomon.

Pro alia ideo la propagandisto estis distingita per la Majstro-Premio „Adalberto Loĝingero". Li inventis monfetistan modelon, kiu – por doni ekzemplon – revizitadis la Trevi-fontanojn de la lando, kaj – dirante kelkajn vortojn kun senerara angla prononco – enfetis kelkajn pencojn. Ĉe la decido pri la nova posteno oni procedis kun laŭdinda zorgemo: oni dungis viron kun granda praktiko pri forfetado de mono – laborintan pli frue ĉe eksporta firmao kiel negoc-peristo kun eksterlando.

Ĉiuj ĉi ideoj apenaŭ helpetis. Ŝajnis pli sukcesonta la penso transigi la aferon de la Trevi-fontanoj en la agosferon de LaKoSto, t.e. Landa Komisiono por Stagnoĉesigo. LaKoSto preparis ĝeneralan agadplanon por ĉesigi la stagnadon de amuzejoj kaj klerigaj institucioj.

Baldaŭ ekis la kampanjo „Mi al vi, vi al mi", por multflanka kaj plejeble ekonomia utiligo de la ekzistanta publiko. Ĉe fiaskintaj filmoj oni lotumis grupajn vojaĝojn al Trevi-fontanoj en la urboj Szeged aŭ Pécs. Ĉe la fontano la partoprenantojn amuzis tuttaga programo; vespere oni aranĝis kvizon; la gajnintoj estis premiitaj per kinejaj abonbiletoj.

Simila kunlaboro estiĝis kun kelkaj multekoste renovigitaj restoracioj, pri kies vizitateco sufiĉas mencii, ke naŭdek kvin procentoj de ilia enspezo devenadis de la du propraj muzikistoj. Kontraŭ tio celis helpi la hungareca vet-vespermanĝo, reklamata inter la fontovizitantoj.

La malnovaj tipaj kungarecaj pladoj: laktokaĉo kun kakaopulvoro laŭ maniero de Johano la Brava, tio estas: ordinara laktogriaĵo elportita de popoldancisto laŭ ritmo de rekrutvarba muziko, kaj la fiŝosupo el ĉevalkapo faris sian eblon; sed la plej multnombran publikon tamen altiradis la kutima vespera interbatalo de kelneroj kaj gastoj.

Elvokis konfidon jam la fakto, ke la komisiitoj de la Hungara Boksista Federacio ĉe la enirejo pesis la gastojn, kaj ili sciigis, ĉu oni apartenas al la pluma aŭ plumba pezkategorio, fine ili montris, kiu samkategoria kelnero onin batos, se oni kritikos la manĝaĵon, aŭ provos prisilenti ion ĉe la pago. Sed la etoso post iom da tempo ĉesis, ĉar la kelneroj ekpostulis pro-danĝeran krompagon; poste, ne ricevinte ĝin, ili venĝis per plejeble ĝentila akceptado de la mendoj. La publiko, perdinta siajn iluziojn pri hungareca vespermanĝo, kompreneble ĉesis vizitadi ankaŭ la Trevi-fontanojn. Baldaŭ montriĝis la praveco de la genia Feuerbach-tezo: „en malriĉulejo ne eblas teni disciplinon"; la gazetaro informadis pri sinsekvaj skandaloj. „Komplicis kun kontrabandistoj la ŝajne senmakula fontanestro." „Du tunoj da francaj artefaritaj okulharoj en Trevi-fontano". La finan skandalon eksplodigis malkaŝiĝo de la sekreto, ke en iu fontano oni aranĝadis akvorevuojn – kun partopreno de kelkaj gvidantoj de la centro.

La skandalojn oni ne plu povis prisilenti, la aŭtoritatuloj ordonis enketon; la malkaŝitaj koruptaĵoj, la kreskanta deficito ŝajnigis oportuna likvidon de la Ŝtata Entrepreno „Adalberto Loĝingero" por Utiligo de Trevi-Fontanoj. La enketintoj proponis, ke la fontanojn – post negrava aldona investado – oni utiligu kiel publikajn necesejojn, ja tiu solvo – kiel ili takte vortumis la aferon – konformas al la reala stato. La ĉefa aŭtoritatulo, subskribante la proponon, rezignacie rimarkis:

– Nur tion mi ne komprenas, kiel la maljuna Glavina el tio aĉetis domon? !

El la hungara: Balázs Wacha

La naturo en la Esperanta poezio

De *Ho, mia kor'* kaj *Mia penso* pasis preskaŭ jarcento, sed dum tiu ĉi mallonga tempo nia originala poezio rapide evoluis. Literaturaj skoloj kaj tendencoj formiĝis en ĝi kaj multaj originalaj voĉoj riĉigis ĝin. **Tamen ni ankoraŭ preskaŭ** ne esploris kian rolon ludis la tradicio en nia originala poezio, kiel niaj poetoj influis unu al alia aŭ kiel la naciaj poezioj influis al la Esperanta poezio. Ni ankoraŭ ne tre bone esploris la ideojn, problemojn, temojn en nia malkohera poezio.

Paralele kun la unuaj deklaraj versaĵoj, en nia poezio aperis ankaŭ intimaj lirikaj poemoj, kies temoj estis amo, naturo, libereco; temoj eternaj ankaŭ por la naciaj poezioj. Tamen estas interese esplori kiel Esperantaj poetoj interpretis tiujn ĉi temojn.

La *naturo*, kiel temo aŭ motivo, okupas apartan lokon en nia poezio. Ne temas nur pri tio, ke ĉiu Esperanta poeto interpretas la pejzaĝon en kiu li naskiĝis aŭ kiu ĉirkaŭas lin. Tio sendube riĉigas nian poezion kaj en Esperantaj poemoj estas ne nur la blua ĉielo de la norda Estonio, ne nur la senlimo de la neĝaj rusaj stepoj, sed ankaŭ la vasteco de la hungara ebenaĵo, la trankvilo de la svisaj lagoj, la aromo de japanaj floroj.

En la Esperanta poezio la naturo reale ekzistas kaj ofte ĝi estas io pli ol nura ekzotika fono aŭ rava pejzaĝo.

Hilda Dresen estas unu el la Esperanto-poetoj kiuj plej profunde sentas la naturon. El ŝiaj poemoj kvazaŭ radias la norda silento kaj trankvilo. Delikate kaj emocie Dresen pentras la konkretajn detalojn, kiuj karakterizas la nordan pejzaĝon. Tiuj estas la betulo, la paduso, la nordaj lagoj. De la poemo *Betulo* ni kvazaŭ perceptas ne nur la kolorojn, sed ankaŭ la aromon de la betulo.

... Betul' beltalia
sur fon' de l' ĉielo lazura
en rob' freŝfolia.

Sur blanka trunketo diskreta
vual' bonodora...
ekvibras en koro sekreta
sopiro dolora.

Tiel lirika kaj melodia estas ankaŭ la poemo *Paduso*. Eble multaj esperantistaj legantoj neniam vidis paduson, sed ĉiuj, kiuj legis la poemon de Hilda Dresen, ekhavis la senton, ke ili tuj ekkonis la paduson aŭ „la reĝinon de l' nordo" kiel mem Hilda Dresen nomas tiun ĉi arbon. Ne hazarde „padus' odoras" fariĝis refreno en la rimportreto kiun Kalocsay verkis pri Hilda Dresen.

Hilda Dresen – padus' odoras
super degela marĉa ŝlim',
betuloj en la malproksim'
blanktrunke vintron rememoras.

Kvazaŭ per infanaj okuloj Hilda Dresen kontemplas la naturon kaj admiras ĝian trankvilon. Per konkretaj detaloj kiel la betulo aŭ paduso, aŭ lazura ĉielo la poetino majstre aludas pri la majesto kaj harmonio de la naturo.

Alia granda nia poeto per aliaj okuloj perceptas la naturon. En siaj poemoj Kálmán Kalocsay strebas penetri en la sekretojn de la naturo. Li klare sentas la konflikton inter la homo kaj naturo. La homo estas ido de la naturo, sed dum jarcentoj li iom post iom malproksimiĝis de ĝi, kaj ĉiu lia nova provo reveni al la sino de la naturo estas malfacila kaj dolora. Tiu ĉi ideo la plej bone estas esprimita en la poemo *Vespero en la parko*.

Senmovas arboj en la parko,
sur la ĉiel' la kurba barko
de Nokt', la Luno flosas.
Oblikve tra la branĉtegmento
vidiĝas en la okcidento
la sun-kisinta firmamento
kiu nun pale rozas.

Sur la fono de tiu ĉi belega bildo estas la homo:

Mi sur la mola herbo kuŝas
kaj mian varman vangon tuŝas
roza herbet' petola.
Kun tiu malhelblua arko
de l' firmament' kun la Lun-barko,
kun parfumsonĝoj de la parko
mi estas sola, sola.

Jen la kontraŭpunkto, la konflikto: en la sino de la naturo la homo sentas sin sola. La homo, kiu ne posedas la perfekton de la naturo, kaj kiu vane provas enpenetri la sekretojn de la naturo.

La Nokto venas brunkolore,
La Nokto nigras jam. Sed fore
La Urb' matenkrepuskas,
La Urb' albrilas por averto:
necesas tie lukti lerto,
en grotoj de ĉi ŝtondezerto
la hom' je hom' embuskas.

Ne hazarde „La Nokto" kaj „La Urb'" estas per majuskloj. „La Nokto" kaj „La Urb'" simbolas la naturon kaj la homon.

En la poemo de Kalocsay mankas la milda lirikeco per kiu Dresen prikantas la naturon, mankas la senkulpa infana rigardo per kiu Dresen kontempladas la naturon. Kalocsay filozofie observas la naturon, li deziras pere de la naturo penetri en la sencon de la vivo, kompreni tiun ĉi absurdon:

... la donacitan vivon fuŝi...

La konflikto homo-naturo emociigas alian nian poeton, Albert Goodheir, sed en siaj poemoj Goodheir estas pli konkreta kaj pli objektiva. Pere de konkretaj detaloj, li spertas veki en ni pli vastajn asociadojn. Tre karaktera estas lia poemo *Morto de kverko:*

Centjara kverko
ombro por bovaro
nun kuŝas sur tero.
Forhakitas branĉoj,
jarringojn multajn
la segilo nudigis.
Majverdo, folifalo –
nun morta ligno.

Ankaŭ Goodheir preferas la antitezon, la kontraŭpunkton kaj la kerno en la poemo *Morto de kverko* estas bazita sur la antitezo:

Jam mortis papilioj.
Vi diras: „Akceptu,
ni devas progresi."
Mi demandas: „Kien?"

En la voĉo de Goodheir ni sentas ironion kaj indignon. La lasta vorto „Kien?" estas ne nur demando, sed ankaŭ akuzo, akuzo al tiuj kiuj konscie fuŝas la harmonion en la naturo.

La naturo ofte inspiris alian nian elstaran poeton. Lajos Tárkony dediĉis multajn poemojn al la naturo, sed en la naturo Tárkony ne serĉas la filozofion kiel Kalocsay, nek la akran konflikton homo-naturo, kiel Goodheir. En la naturo Tárkony serĉas la azilon. Liaj poemoj estas melankoliaj elspiroj kaj la poeto sopiras la ekvilibron inter la naturo kaj la homanimo. Nur unu „arbeto petunia" povas veki en li noblajn sentojn kaj karajn rememorojn. Tárkony por momento kvazaŭ haltigas la tempon por povi trankvile kontempladi la arbeton kaj revoki la pasinton.

Mi kvazaŭ min retrovis en brakoj de l' patrino,
tia trankvilo regas nun en interno mia,
„Ho, mia fil'! – mi aŭdas en dolĉa halucino...
Odoras subfenestre arbeto petunia.
(Petunio)

Kiam ni parolas pri la naturo en Esperanta poezio, ni ne rajtas preterlasi la nomon de John Sharp Dinwoodie, en kies poemoj la naturo estas ĉeftemo kaj kiel prave rimarkas Benczik en sia studo *Kvaropo kaj la skota skolo*, „Dinwoodie sentas fortan amon al la naturo; ĝin li konsideras enkorpiĝo de la dia ekzisto." Kaj eble ĝuste tial la pejzaĝoj en la poemoj de Dinwoodie estas majestaj, sed iom abstraktaj. En ili ni ne sentas la aromon de la florantaj arboj kiel en la poemoj de Dresen, aŭ ni ne sentas la profundan silenton de la vesperiĝo kiel en la poemoj de Kalocsay, aŭ la konkretajn detalojn kiel en la poemoj de Goodheir.

Dinwoodie pentras majestajn bildojn, antaŭ kiuj ni pie staras, havantaj la senton, ke ni estas etuloj en la sino de la naturo kaj la senlima universo.

Hodiaŭ staris mi sur alta monto;
flagretis la unua sunradio
fajrruĝe sur la fora horizonto:
eksonis matenpreĝa melodio
de la vaneloj. La dormanta mondo
ektremis en vekiga konvulsio.
(Hodiaŭ staris mi:..)

Multaj niaj poetoj prikantis la naturon. Ni povas mencii ankaŭ la nomojn de Devjatnin, Hohlov, Edmond Privat, Nisimura Masao, Kenji Ossaka, Marjorie Boulton, Eli Urbanová, eĉ la plej junajn Nicolino Rossi kaj Maŭro Nervi. Ĉiuj ili diversmaniere kaj originale perceptas la naturon. Iuj vidas en la naturo fonton de ĝojo kaj harmonio, aliaj serĉas en la naturo la respondon de la eternaj demandoj de la vivo, por triaj – la naturo estas spegulo de iliaj pensoj kaj emocioj. Ofte la Esperantaj poemoj verkitaj pri la naturo, per siaj melodieco kaj lirikeco montras la plej bonan flankon de la talento de multaj niaj poetoj.

Georgi *Mihalkov*

Hungara Vivo en FRG

Jen, Hungara Vivo ekspoziciita dum la konferenco de instruistoj de latina lingvo en Mainz (Federacia Respubliko Germanio) en februaro en 1982. La ekspozicieton aranĝis kaj ĉi tiun foton faris d-ro J. Kondor.

Libere utiligeblaj

La lingva problemo de la Movado de la Nealiancitaj Landoj – kelkaj rekomendoj. De Tibor Sekelj; 13E. – Ses esplorcentroj pri interlingvoj. De Cornelius J. McKown. 15E. – Serio de Esperanto-dokumentoj. Eld. UEA, Rotterdam, 1981. 20 cm. p. 12. resp. 8.

Antaŭ dudeko da jaroj estis fondita en Beogrado la Movado de Nealiancitaj Landoj, kiu konstante progresanta jam enhavas pli ol cent ŝtatojn-membrojn. Estas ĝenerale konata la grava influo de tiu movado al la paca solvado de la mondaj problemoj. Inter siaj celoj prezentas sin, apud la politika kaj kultura sendependeco de ĉiuj popoloj, ankaŭ la kultura sendependeco. La dokumento montras detale, kiel tiu ĉi principo kontaktiĝas kun la lingva problemo, kaj en praktika maniero aludas al la interkompreniĝo ene de la Movado, al ties malfacilaĵoj. Modele konciza kaj klara argumentado pruvas la netaŭgecon de naciaj lingvoj, la kulturan koloniismon pere de la antaŭaj koloniaj lingvoj, kaj rekte konkludas al nia solvo, neŭtrala kaj la propran kulturon protektanta. Pri Esperanto la dokumento en plej moderna, eĉ frapa maniero donas ne nur skizon (por uzo de enlandaj pioniroj kaj pledantoj), sed ankaŭ demontras ĝiajn *paralelajn karakterizojn* kun Aziaj kaj Afrikaj lingvoj, demonstrante: „... el kelkaj gravaj vidpunktoj Esperanto estas pli simila al iuj lingvoj de Afriko kaj Azio, ol al tiuj de Eŭropo." La nealilancitaj landoj bezonas *komunan* duan lingvon, kiucele Esperanto estas prete proponebla. Ili povas multe profiti per ĝia enkonduko en siajn interrilatojn, kaj tiel ankaŭ kontribui al la monda solvo de la lingva problemo. La dokumento prezentas eminentan, ĉiulande taŭge uzeblan-uzindan bazon por pledado kaj konvinkado de lokaj aŭtoritatoj.

Pri ses plej gravaj bibliotekoj – ujoj de la homa scio – informas mallonge la dua dokumento, por helpi al esplorantoj, serĉantoj de materialoj por siaj studoj, koncerne Esperanton, eĉ diversajn interlingvo-provojn. La faktoj kaj indikoj, liveritaj de la ses bibliotekoj en si mem estas imponaj, kaj stimulantaj por utiligi la vaste proponatajn servojn... Eble estas fierado, tamen menciindas, ke temas ankaŭ pri *du Hungarlandaj* E-bibliotekoj: Biblioteko Somogyi, Szeged, kaj tiu de Universitato Eötvös Loránd, Budapeŝto.

o

Faktoj el la nordo

La laponoj de Norvegio kaj ilia historio. Verkis prof. A. Nesheim, trad. Erling Anker Haugen. Serio „Norvegio – Informoj". Eld.: Ministerio de Eksteraj Aferoj, Oslo. 8 p. 30 cm. kun multaj fotoj sur luksa papero. Senpage ricevebla ĉe Norvega E-Ligo.

Granda parto de la plej norde vivanta popolo de Eŭropo, la laponoj (aŭ Sameoj), loĝas en Norvegio, en proksima kontakto kun la naturo, boacojn bredante kaj ĉasante. Verŝajne oni ĝenerale nur tiom scias pri la laponoj, apenaŭ pli. Tial ŝajnas dankinda tiu ĉi detala, tamen ne tre longa informo, kiu malkovras multajn interesajn flankojn de la antikvajn trajtojn ankoraŭ gardanta popolo. La severaj vivkondiĉoj bezonis konvenajn kutimojn kaj socian sistemon, kiuj necese kreiĝis, kaj pro la ne multaj ŝanĝiĝoj de rimedoj daŭre restis. La eksteraj impulsoj tre malrapide efikis, kio savis la popolon ĉesi esti laponoj; se ie la impulsoj estis tre fortaj, oni tie rezignis eĉ pri sia lingvo! Malgraŭ multaj klopodoj integri ilin en la najbaran socion, ĝis nun la laponoj plejparte kontraŭstaris, sed nun la tre proksimaj kontaktoj kun la moderna kapitalismo „tiris ilin en ties mon-orientitan kaj konkurencan modelon". Malfortiĝas tradicioj, kaj la motorsledo rompas la intiman rilaton kun la boacoj; sed la danĝero pri denacieciĝo igis ilin krei kulturon defendantajn organizojn. De 1967 la lapona lingvo jam estas uzata en la unuaj klasoj de infanoj, kaj estas jam gimnazio, kie ĝi estas elektebla studobjekto. La Norvegia sinteno rilate laponojn laste favore ŝanĝiĝis, kaj tio aktivigas la laponojn en ilia kultura, socia kaj ekonomia batalo, ankaŭ per la Norda Laponkonsilio.

La plaĉe ilustrita, serioze traktanta informaĵo estas salutinda kulturcela kontribuo. La norvega ministerio faras bonan servon por sia lando per tiu serio, kies antaŭa peco traktis la vivon kaj verkadon de la granda dramverkisto *Henrik Ibsen*; kaj atendas intereso ankaŭ la promesitajn sekvontajn pri la malnovaj fostaj preĝejoj kaj pri la Vikingaj ŝipoj. Espereble la tradukoj estos same senriproĉaj.

o

Eksterordinara esperantisto

Trifon Ĥristovski: Mia vivo. El la bulgara tradukis kaj enkondukis Nikola Aleksiev. Eldonis: Sofia Pres, 1981. 180 p. 20 cm.

Dum legado de tiu membiografio de denaske kripla, vilaĝa *verkisto*, konstante kreskas ia profunda admiro pro lia eksterordinara energio per kiu li superis sian propran missorton. En ege mizeraj cirkonstancoj la paŝi ne kapabla fileto de kamparanoj instruis sin mem, levis sin laŭgrade pli kaj pli alten mense kaj spirite por venki sian korpan malkapablecon, la suferigajn malsanojn kaj la preman malriĉecon de la familio. Oni ekkonas la malriĉegan bulgaran vilaĝon ne longe post la liberiĝo de sub la kvincent-jara turka jugo. Denove militoj ekskuis la ĉiuflanke prirabitajn, tre-tre simplajn vilaĝanojn, komence de nia jarcento. Ĥristovski kapablas literature desegni kaj starigi ilin antaŭ ni per okuloj de parenco, de proksimulo, kaj tio donas elstaran art-efikon al lia verko, vere romano de lia vivo.

Estas mirinde, kiel la juna homo, kvankam alkatenita al sia ĉambreto, malfermas por si la mondon, unue la distrikton kaj sian landon; poste – lernejon neniam vizitinte – li *alpropriĝas Esperanton* por alvenigi al si per surprize vasta korespondado kaj gazetlegado aferojn el la vasta mondo. Li ne povas sin movi, tamen *movadon* partoprenas arde kaj hardite, parte la Esperantan, plie la revolucian lukton de la bulgaraj laboristoj kaj kamparanoj en epoko de fortikiĝanta faŝisma

reakcio. En lia historio alternas vivplenaj scenoj de sukcesoj kaj malvenkoj sub la muelŝtona premo de la reĝa potenco, kiu tamen heligis la politikan kleron de multaj vilaĝanoj. Liaj artikoloj aperis ankaŭ en eksterlandaj laboristaj E-revuoj, eĉ atingis la nacilingvajn; enlande la reĝa cenzuro jen kaj jen bremsis la presigon de liaj verkoj, kiuj igis foje riverenci eĉ funkciulojn el la malamika tendaro. Li ne povis atingi sian 40-jariĝon, nek la sopiritan venkon: monatojn antaŭ la liberiĝo de Bulgario (1944) liaj fortoj plene elĉerpiĝis en tiu tago, kiam persiste skribanta li finis la nun recenzatan membiografion.

Pluraj eldonoj de la bulgara originalo igis ĝin fama ĉe la publiko, kies junaj tavoloj legas ĝin kvazaŭ raportaĵon pri forpasinta epoko, pri la popola vivo. Lia iama redaktoro kaj amiko, Nikola Aleksiev prave prezentis nun al la E-a mondo la admirindan homecon de eksterordinara viro. Lia fidela traduko – kion atestas kelkloke bulgarismoj nerimarkitaj de redaktoro – per verva kaj flua stilo incitas legi la libron dum unu etapo.

o

Problemoj de la nuntempo

Todor Ĵivkov: Raporto de CK de Bulgara Komunista Partio antaŭ la XII kongreso... Eldonis: Sofia-Pres, 1981. 108 p. 19x13 cm.

Dum akriĝo de la internacia streĉiteco kaj malfacilaĵoj en la monda ekonomio, BKP serĉas la vojojn, sur kiuj la socio povas solvi siajn problemojn spiritajn kaj ekonomiajn. Kiel igi pli intensa la kreativon de la bulgara popolo en ĉiuj gravaj sferoj de la vivo, por plialtigi ties nivelon laŭ la kreskintaj homaj bezonoj en la socialisma evoluo – pri tio prezentis ampleksan bildon kaj agoplenan horizonton tiu ĉi raporto al la partia kongreso.

La tradukantoj ne surprenis facilan taskon, ĉar – tiuj rimarkeble – nia politika–ekonomia esprimaro ankoraŭ ne estas taŭge formita: la enlande uzeblaj esprimoj ofte ne estas korelativaj, do uzeblaj internacie! Kelkaj el tiuj estas glosendaj (fine de la libro, kaj ne kiel piednoto, oni ja ne legas tian tekston kiel romanon), kiel ekz. „malgrandtuna kemio", „poligrafio" k.a.; ĉe aliaj estas preferinde dissolvi la tro koncizajn, eĉ se tiel la teksto eventuale iomete plilongiĝos. Gajnos certe la klareco de la direndo, se oni ne gluiĝas supraĵe al la sinsekvo de la vortoj. Gramatikaj malglatajoj, parte pro la diversaj tradukintoj, foje ĝene antaŭvenas (gajno de ili - ilia gajno: koresponda - responda: ili venas sin realigi la homo, la laborhomo k.s.), kaŭzantaj iom da perturbo – kaj pli da meditado en la cetere bone legebla kaj leginda teksto de la raporto.

Ervin *Fenyvesi*



De



jaroj

je la

servo

de la

loĝantaro

GAJA PAĜO

Amindumante

la viro longe verŝas la glorigajn vortojn:
– Ho, vi mirinda! Kiaj belegaj okuloj, mia dio! Ho, tiuj sorĉaj okuloj, mi legas el ili...
– Vere? Kaj ĉu vi ne ofendiĝis?

Ŝajne amindumante

la ĉefo montras grandan intereson:
– Kian programon vi planis por la semajnfino, fraŭlino Katinjo?
– Oh, nenion, sinjoro ĉefo – hezitas atendeme la fraŭlino.
– Tiam bonvolu urĝi lunde, por precize alveni en la oficejon...

Ŝajne aĉetante

mangestas la ĉefo al la aŭdaca dekoltaĵo de kolegino Ginjo:
– Tiu ĉarma, ĝi estas verŝajne por vendi, ĉu ne, sinjorino?
– Ho ne, sinjoro, nature ne!
– Tiam bonvolu tuj ĉesi la varbadon, sinjorino Ginjo!

Imago de mago

La mago liberigas la spiriton el la botelo, kaj ĝi levas sin dankeme:
– Kion vi deziras majstro?
– Finfine, mi kontentigos miajn sopirojn! – ekzaltiĝas la mago – alportu rapide al mi: vinon, delikataĵojn kaj virinojn!
– Ej, ej, momenton... – murmuras la spirito – petu nur teon aŭ lakton... ĉu vi imagas, ke mi estas milionulo?

Indaj indianoj

La maljuna Ono de Bizono, la Granda Ĉefo, trankvile fumas pipon antaŭ sia kabano. Sed jen, lia edzino, la (iam) ĉarma Vino de Cervino alkuras kriegante:
– Ho, Ono de Bizono, urĝe elterigu la batalhakilon!
– Kial? Ĉu venas la palvizaĝuloj?
– Ah, ne! Mi tuj bezonas brullignon por kuiri, ĉar difektiĝis mia elektra kuirforno.

La fama esperantisto

kiu esploris jam montarojn kaj marojn kiel fama gasto ĉe familio pasie rakontas pri siaj aventuroj inter kanibaloj.
– Ho, ege mi bedaŭras, samideano – afable pardonpetas la dommastrino –, eble malplaĉos al vi... sed mi preparis por vespermanĝo *nur porkajon!*

Grafologo

– Eĉ el *tajpita* manuskripto mi kapablas – diris la ĉefredaktoro–grafologo – konstati, se iu skribas sentalente...

Afablega dommastro

– Por honori la karegajn gastojn, mi malfermos trinkakvo-botelon el la jaro 1948. Tiam ĝi estis ankoraŭ malpli klorita.

Erare

vi asertis, ke Klara estas ankoraŭ sensperta ineto; jam ŝi naskis fileton, nur tri monatojn post la edziniĝo – grumblas junulo.
– Nu, videble, ke mi pravis!

Flanke-demande

– Ĉu via forta flanko?
– Mia edzino...
– Kaj via malforta flanko?
– Alies edzinoj...

Besto-testo

– Kiu estas la plej daŭre utiligebla besto?
– La koko... konsumebla antaŭ sia naskiĝo, kaj post sia morto...

E.F.

Mi nur volis certiĝi, ke li mortis...



VIZITO EN GDR

En majo s-ino Deák, oficistino de la Libroservo de HEA, gastis ĉe sia leteramiko – Friedrich Krake, grupestro en Apolda. Tiu ĉi ĉarma urbeto situas en Turingio, romantika landparto de GDR. Jen s-ino Deák raportas pri sia vojaĝo:

Je la 12-a de majo mi estis invitita, kaj partopreninta la feston okaze de la 70-a datreveno de la unua Esperanto grupo fondita en Apolda. La vesperon partoprenis ankaŭ sinjoro Buleman – furnalisto de la gazeto Turingia, kaj gastoj el la grupo de JENA. Por la furnalisto, kaj ĉar en la grupo estis ankaŭ komencantoj, la festo estis dulingva, ĉiuj paroladoj estis tradukitaj en germanan lingvon. Sed mi certas, ke pro tio ne malgrandiĝis la valoro de tiu ĉi belega vespero.

Unuafoje oni salutis min – kiel unuan eksterlandan gastinon de la grupo, poste la gastojn el Jena. Ni ricevis memfaritan flageton kun skribaĵo „Grupo de Apolda". Tiuj ĉi momentoj estis por mi intimaj kaj neforgeseblaj. Poste la grupestro parolis pri la unuaj grupanoj, kiuj estas antaŭ ili modeloj. Kaj parolis pri la nuna grupeto, pri la vojo kiun ili trairis dum du jaroj.

Poste mi mem festparolis. Salutinte la grupon mi taksis ilian rezulton, kaj rakontis pri la malfacila vojo de esperantistoj. „En nia movado la plej grava afero estas la kredo. Se vi pensas, ke vi ne havas rezulton, vi devas kredi, ke vi havos tion morgaŭ, postmorgaŭ. Ĉar la kredo estas jam duona sukceso."

Disdono de donacetoj el Hungario

La dua parto de la vespero pasis per gaja babilado, amikiĝo. Nun, kiam mi surpaperigas tiujn ĉi liniojn, mi devas pensi pri ĉi tiu klubo, pri la neforgeseblaj tagoj per dankplena koro.

Kvankam mi jam travojaĝis kelkajn urbojn, simile hejmeca atmosfero nenie estis trovebla. Ankoraŭfoje mi dankas pro la belega vespero kaj feriado, dezirante pluajn sukcesojn. Ĝis revido en 1983! Ĝis revido en Budapeŝto!

Maria Deák

LETERKESTO

Perevertajlo, Eŭgeno, *Taŝkento,* SU: Viaj streboj estis do sukcesaj, ĉar la diverslandaj reagoj de esperantistoj instigis la redakcion de la buntkolora SOVETA UZBEKISTANO aldoni kvarpaĝan Suplementon de E-aj tradukoj de gravaj artikoloj. La unuaj numeroj jam plezurigis nin per E-aj tekstoj, kaj oni povas atendi de la legantoj, ke ili denove esprimu perletere siajn kontenton aŭ rimarkojn. Nia propono: al la vere tre belaj bildoj por plia plezuro indas doni E-an klarigon, far via tradukista kolektivo.

Broda, Andreo kaj Eŭgeno, *Koŝalin,* PL: Via kursgvidanto prave stimulis, por plibonigi la lingvoscion, *legi E-ajn gazetojn.* Ni emas aldoni, ke tiucele oni kutime bone utiligas ankaŭ nefreŝajn numerojn, ĉar en ĉiuj troviĝas almenaŭ kelkaj legindaĵoj, kiuj vastigas kaj igas ekzerci viajn konojn pri E-o. Do tiel plu! kaj ni aparte ĝojas, ke elinter la revuoj vi trovis plej ŝatinda Hungaran Vivon por distro kaj lingva ekzercado.

Chabrier, Anne-Marie, *Parizo,* F: Ni devas – eble pardonon petante – aprobi vian iom ĝenitan rimarkon pri la titolo de *„ĉiutaga historio"* de Sz. Bálint. Kvankam vi akceptas la realecon de tiu historieto kaj la komplikaĵojn inter la dise kokrantaj geedzoj, tamen vi rifuzas konsideri similajn aferojn „ĉiutagaj". Pri statistiko de geedzaj trompoj ni kompreneble havas nenian dokumenton, kaj – kredu – ni vane detektivis inter niaj redakcianoj pri „aferoj", do ni devas rekoni ankaŭ laŭ viaj Parizaj spertoj, ke pli preciza estus tia titolo: „Kurioza historio", eble eĉ „Ne-ĉiutaga historio". Estas kiel ajn, ni atendas, kian „daŭrigon" kompilas pri ĝi niaj legantoj.

*

Lejboviĉ, T.S., *Lvov,* SU: Preskaŭ cent jaroj pruvis jam, ke E-o ne disfalas je „naciaj" dialektoj, kion malice aŭguris iam kelkaj malamikoj de nia lingvo. Ankaŭ laŭ opinioj de psikolingvistoj tia fenomeno aŭ transformo ne devas okazi inter la modernaj cirkonstancoj ĉe interlingvo. Kompreneble tio ne ekskludas, nek forigas la devon: *gardi nian lingvon* en ĝia pura kompreneblecco, precipe kontraŭ nedeziratai naciaj influoj – same kiel okazas ĉe naciaj lingvoj, kiuj ankaŭ devas ŝirmi sin. Aliflanke: *kulturaj diferencoj* ĉiam troviĝas inter landoj kaj popoloj, kaj ne la lingva transpontado kulpas, se la publiko, vivanta en alispeca kulturo, ne kapablas kompreni sen klarigo iun „mesaĝon" aŭ komunikaĵon. Ni tre bedaŭras, sed vere eblas, ke leganto en Bagdado aŭ kie ajn, se ne konas kristanajn legendojn, ne komprenis ekzemple la „Demandoj" de M. Ladányi (en n-ro 1982/1), kies metaforoj aludis al la krucumo de Jesuo Kristo. (Do ne temis pri Hungarlandaj naciaĵoj.) Pentrado havas ja sian „internacian lingvon", tamen ni mem spertis, kiel la legendojn ne konantaj vizitantoj – rusoj kaj eksterlandanoj – ne komprene rigardis la admirindajn ikonojn de la mezepoka grandioza pentristo Rubljov. Ili devis – manke de gvidisto – bedaŭrinde rezigni pri la vera percepto de tiuj artaĵoj. Certe malofte, sed io simila povas okazi, precipe ĉe poemoj, ankaŭ en E-aj revuoj. – Koran dankon pro viaj afablaj rimarkoj.

Gafur Gazizi, *Ufa,* SU: Eble via familia nomo estas la ne-kursivita, sed niaj konoj rilate la Baŝkiran lingvon ne sufiĉas por bone distingi inter la viraj nomoj, do tiukaze ni petas indulgon. La poeziaj eksperimentoj kunportis plezuron por ni, ĉar spegulis serenan koron, kun kapablo formi ĉarmajn versojn. Lingve senriproĉe kantas viaj poemoj, eĉ se ili ankoraŭ ne atingis la gradon, kian postulas la publiko de poemo en revuoj. Longa ekzerco faras la legindan poeton, kion ni devas amike substreki.

El «Hungara Antologio»

Kvindek jarojn post la unua, venontjare aperos la nova, dua *Hungara Antologio*. Ĉi-foje ni citas la duan strofon el la poemo „Memorskribo" de János *Vajda*.

„Ho hom' pasema, reĝ' aŭ almozulo..." – la daŭrigon vidu en linioj **H.2, V.46, V.1, V.26** kaj **V.50**. (Ensendendaj linioj.) Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo. Inter la solvantoj ni lotumos premiojn.



Horizontale: **15.** Pasigi aermason tra ĉambro **16.** Spireblan nesimplan gason **17.** Kantbirdo (R) **18.**.Kapti **19.** Monaĥejestro (R) **20.** Ekstrema parto de akso (R) **21.** ...grafio: scienco pri popoloj **22.** Ĉesigi ies dormon (R) **23.** Komercaĵo **24.** Miksata membro! **25.** Pastra kunveno (R) **27.** Rapida nevola malleviĝo **28.** Tempopaso ekde naskiĝo (R) **29.** SJ **30.** Supernatura estulo (R) **31.** Libera je mikroboj **33.** Numeralo **34.** Sufikso esprimanta kolekton **35.** Li scienco esploras la vivulojn **36.** Sidloko de reĝoj (R) **37.** Ŝipveturas **40.** Korsento **41.** Estanta el valormetalo **42.** Kampa tendaro (R) **43.** Mezurunuo de elektra rezistanco **44.** Ovoforma **47.** Kartofiguro de reĝino (R) **48.** Prepozicio montranta la kaŭzon **49.** Plivolonte **51.** Inklinas **53.** Maŝinpafilo **55.** Fari, aktivi (R) **56.** Subspeco de animaloj (R) **57.** Helena nimfo (Acis kaj...) **58.** Verba finaĵo **59.** Romia 45.**60.** Interjekcio**61.** Fermas la vojon**62.** Aldoni beligajn detalojn (R) **64.** Bulgara Esperanto-Asocio **65.** Perua remaĉulo **67.** Lirika poemo **68.** Ŝmirtaŭga mola substanco (R) **69.** Islama titolo de princoj **71.** Sono de serpento **73.** Nerekte paroli pri io **74.** Patrina ŝirmejo **75.** Purigi ekz. korton **76.** Kora karulino (R)

Vertikale: **2.** Kapablaj facile fari ion **3.** Loko por ludoj en cirko **4.** La pluraj, samloke ĉeestantaj! **5.** Ŝati kore iun **6.** PI **7.** Dormon kaŭzanta drogo (aĵo-o) **8.** Rumania mono plurale **9.** Malgrandaj partoj **10.** Manĝegi (R) **11.** Unuiĝintaj Nacioj **12.** Kiel H.69 **13.** Filo de frato **14.** Sil... (rivera rabfiŝo) **19.** Formis ideojn mense **20.** Koloron perdinta **22.** Persona pronomo **23.** Intermonta loko **25.** Refleksiva pronomo **27.** Sukerdolĉa mola frukto **28.** Grupo, amaso **30.** Flosas laŭ puŝo de la fluo **32.** Eŭropa ĉefurbo **33.** Bonvolu la libron... (R) **34.** Fortege deziras ion **35.** Kuiri en forno (R) **36.** Atingas la celon **38.** AB **39.** Skalo (R) **41.** Miksita veo **43.** Rektangula **44.** Valormetalo **45.** Sufikso **48.** Kemia fonto de elektra energio **49.** Suba parto de piedo **52.** Printempa monato (R) **53.** Ankoraŭ ne oceano **54.** Meteoro (R) **57.** Kiel V.39 **58.** Radiko de V.5 **59.** Plendkriadis **61.** Iama arta stilo (R) **63.** AO **64.** Bova, ĉevala, porka **65.** Esperantologo, germana (Ulrich) **66.** Ido **68.** Batalilo (R) **70.** Poseda pronomo **71.** Miksaĵo de graso kaj alkalaĵo por lavi (R) **72.** Radiko de H.61 **73.** Agrablega sento **75.** BU **76.** AP

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1982/1: STOMAKO MALSATA NUR PRI PANO MEDITAS – SUR ĈEVAL' DE NAJBARO LA ŜARĜO NE PEZAS.

Libropremion gajnis per lotumado: Anna *Dvoráková*, Turdoŝin, CS; *Fórizs* József, Gyöngyös, H; Henryk *Wower*, Slupsk, PL. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

* Ekzameno sen risko *

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?

de János Elem

La ĉeftemo de tiu ĉi teatraĵo estas la embarasoj en monda turismo. Grupo da turistoj, amantoj de ekzotiko, restas solaj en la dezerto. Eble ankaŭ vi deziras ekscii pri ilia plua sorto en tiu loko. La jam prezentita teatraĵo (dulingve eldonita de HEA) kurioze respondas.

1. Kiel nomiĝas la filo de Jeva?
2. Kiu diras la sekvajn vortojn: „Pardonu min, sed *mi ne komprenas, nur parolas* vian lingvon."?
3. Kiu rolanto ŝatas ludi ŝakon?

Limdato por la respondoj: du monatoj post alveno de la revuo.

Ĝustaj solvoj de la demandoj en la n-ro 1982/1 pri la *111 fabloj de Krilov:* 1. Per fiŝsupo, 2. „La pasantoj kaj la hundoj", 3. „Sed verdas, - mankas la maturo: Acidas certe la vinber'."

Libropremion gajnis: Antonina *Tonti*, Moksvo (SU) kaj Max *Hillebrand*, Jablonec, n/N (CS).

Korespondi deziras

Profesoro Sylvio *Malheiros* pri sociaj temoj, malbonaj kutimoj, i.a. pri uzo de drogoj, orfoj, fraŭlinaj patrinoj, infanoj en senedziĝinta familio ktp. *Rio de Janeiro,* Rua Araxa 40, apt. 202, Grajau, 20.561, Brazilo. – F-ino Ene *Pärnits* (20) pri literaturo, lingvoj, muziko, vojaĝoj, precipe kun hungaroj kaj germanoj. Kol. pm, bk. *Tallinn,* Külmaallika 6-1, Estonio, SU-200 026. – S-ino Adriana *Nikolova* (25) oficistino, *Belovo,* str. Jundola 3. kv. 1. ap. 3. BG-4470. – Arkitekto Mihály *Szabó* (27) kol.-interŝ. sportbildojn, sportajn akcesoraĵojn, bildojn de trupoj, certe respondos. *Debrecen,* Hajdú J. u. 9. VII/62. – Instruistino Elga *Jakabsone* (39) pri muziko k.a. temoj, ktm. *Liepaja,* str. Dorupes 7-6. Latvio, SU-229 700. – Peter *Ĉekme* (28) instruisto, vegetariano, pri naturbelaĵoj, muziko, E-movado – literaturo, pm, kun geamikoj en Hungario, Bulgario, Rumanio. *Žarnovica,* Mierová 61-10, CS-966 81. – Inĝ. Waldemar *Gado* (53) pri historio, filatelo, turismo, interŝ. bk, pm. *Warszawa,* Batorego 37-19, PL-00-612. – F-ino Maria St. *Ŝopova* (21) oficistino, kursgvidanto, *Belovo,* str. V1. Georgiev 79. BG-4470. – Instruistino *Dulcienė* Aldona (45), ktm, *Kvedarna,* Žalioji gt. 1-10. SU-Litovio. – Instruisto Januŝka *Martynas* (28) ktm, *Mažeikiai,* Natfininky gt. 10-27. Litovio, SU-235 500. – Violeta *Balabanova* (24) oficistino, *Belovo,* Bul. Osvobojdenie 87, Bl. 3, vh/A. BG-4470. – Inĝ-ino Dzidra *Vecbrale* (32) pri muziko, historio, turismo, ktm. *Liepaja,* str. Krümu 57-18. Latvio SU-229 700. – Justyna *Kijak* (21) studentino de lernejo pri turismo, kun geamikoj, pri samaĝuloj en tm. *Wrzosowa,* ul. Katowicka 9. PL-42-263. – S-ro *Maradi* István (18) pri tekniko, politiko, landoj, pm, ktp. *Esztergom,* Honvédtemető u. 13. H-2500. – S-ro Ernest *Tews* pri Eo, bk, pm, glumarkoj, revuoj, ktp. *Bielawa,* Os. Wtokniarzy 5/18. PL-58-260. – Eleonora *Worsztynowicz* (22) studentino pri libroscienco, ktp pri literaturo, kulturo, *Ŝrem,* ul. Poznanska 26/37, PL-63-100. – Alicja *Jozwók* (42) ekonomikistino ktm. interŝ. pm. *Vroclavo,* str. Bobrza 16m16, PL-54-200. – *Ribak* Konstantin teknikisto interŝ. pm, *Nikolajev,* pr. Mira 25-135, Ukrainio SU-327 044. – Nikolaj *Jakimĉuk* (26) instruisto, pri literaturo, filmo, historio, lingvoj ktm. *Novovolinsk,* ul. Gagarina 6/47, SU-264 920. – Venka Bl. *Vasileva* (19) oficistino, *Belovo,* str. 14. August 47. BG-4470. – *Zvikaitė* Giedrė (18) studentino, ktm, *Kaunas,* Narucio gt. 44-28, Litovio SU-223 031. – *Vasiljeva* Ania (18) studentino, ktm, *Leningrad,* Ligovskij prosp. 143-27, SU-196 007. – *Lapelienė* Regina (24) instruistino ktm, *Vilnius,* Virŝuliŝkius gt, 47-26, SU-Litovio. – *Gasparaitytė* Nida (19) studentino de lingvo/literaturo, interŝ. pm, bk, ins. diskoj. *Plikiŝkiai,* Litovio-SU-235-156. – *Ŝevĉenko* Jurij (22), studento de arkitekturo, ktm, pĉt, prefere junulaj, kol. ekslibriso, poŝkalendareto, disko, glumarko. Resp. garantias. *Kiev,* Lenin str. 39-102, SU-252 030. – Ina *Marĉtulionytė* (19) studentino, pri teatro, kino, literaturo, interŝ. bk, k.a. *Tauragnai,* Litvanio, SU-234 911. – *Vandiŝ* Olga (17) lernantino, pri E-literaturo, franca lingvo, bk de urboj kaj estradkantistoj, diskoj. *Riga,* str. Kr. Barona 114-15, Latvio, SU-226 001. – *Dajkó* Pál (16) lernanton interesas sporto, *Jászfényszaru,* Honvéd út 36. H-5126. – Andrej *Prozukin* (15) pri moderna muziko, sporto, artoj, kol. bk, *Jurga,* ul. Kirova 16-57. SU-652 000. – *Torbik* Vjaĉeslav (18) studento pri lingvoj, kol. bk, ins. interesas lingvoj, sporto, muziko. *Barnaul,* ab. k. 801, SU-656 015. – Instruistino *Skurdenienė* Irena (26) ktm, Valdas *Banaitis* (40) psikiatro kun kolegoj pri poezio, grupa terapio, psikiatrio, alkoholismo, *N. Vilnia* Pergalės, 36-45, Litovio SU-232 048. –– Er. E. *Laiconas* (32) speleologisto pri sporta esplorado de kavernoj, interŝ. pri kavernoj, speleologio bk, foto, pm, ins. prosp., eldonaĵojn, emblemojn k.s. *Kaunas* Kestucio 3-8. Litovio, SU-233 000. –– F-ino Veska *Paniĉarova* (20), oficistino, *Dábravite,* BG-4472. –– Mladen Dim. *Mladenov* (33) fraŭlo, laboristo, *Belovo,* str. Bl. Zahariev 81, BG-4470. –– Georgi Petrov *Lazarov* (34) laboristo, *Mom. Klisura* BG-4468. –– *Samloke:* s-ro Jordano Ang. *Nikolov* (40) oficisto. –– Liljana Blag. *Marinkova* (46) instruistino –– Boĵana *Pavlova* (46) instruistino –– Stoilka *Duneva* (30) oficistino –– Iliana *Nikolova* (32) oficistino –– F-ino Ziljana *Marinkova* S-ro Vito *Scarola,* fraŭlo, pri sportoj, makrobietika dieto, naturismo, povas gastigi en apudmara feriejo, *Modena,* Rua Pioppa 107, I-41 100. –– Politeknika Altlerneja *E-Klubo en Tomŝk* a.k. 261, SU-634 041: junaj inĝenieroj/inoj, teknologinoj, studentinoj korespondus pri div. fakoj, tm. kaj E-literaturoj, arto, muziko, instruado, kino, modo k.a.: inĝ-energetikisto *Sljafer* Mihail (23) proponas ankaŭ rec. gastigon –– *Bajdalinova* Madina (18) studentino pri dancoj, fotoarto – *Vagapova* Raŝida (25) inĝ-teknologo, arto, modo, E-kantoj, bk. Kaj aliaj gemembroj. –– S-ino Inga *Johanson* serĉas tramo- aŭ bus-ŝoforojn kiuj korespondos kun ŝiaj samfakaj gelernantoj. *Göteborg* Stampgatan 60. B II, S-41 101. –– Estraro de VES „G. Dimitrov" dez. kor. kun ges-anoj en Berlino, Budapeŝto, Dresdeno, Prago, *Belovo* Bul. Osvobaĵdenie 72, Klubo de Aktivaj Batalantoj. –– S-ino *Galiniene* Ruta (24) dentist-teknikisto, ktm, *Saldutiŝkis,* SU-234 900.

Panevėžys, Grigo gt. 33-55. SU-Litovio. – Instruistino *Baukienė* Eleonora (43) ktm, *Vilkaviŝkis,* Rüty gt. 4, Litovio, SU-234 270. – *Lukoseviĉius* Kazimieras instruisto, gvid. de E-rondo, kun Aŭstralio, Aziaj kaj Afrikaj landoj, *Saldutiŝkis,* Litovio, SU-234 900.

E HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** Arta redaktoro: **Judit Somhegyi.** Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, d-ro Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Cefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193, H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** + Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162. 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 78,-; al eksterlando por unu jaro 90,- forintoj. + Peranto al eksterlando KULTURA (P.O.B. 149, H-1398, Budapest). Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo ÉTK, Budapest. Respondeca gvidanto: Raffay Rusztem, direktoro.

Indexszám: 25 377 • ISSN 0018-7704 • ÉTK Nyomdaüzem 820859

Sono-fidelo de supera grado Orion Hi-fi turo

Hifi Stereo

- Hi-fi stereo gramono
- Hi-fi stereo AM/FM tuner
- Hi-fi stereo laŭtigilo
- Hi-fi stereo kaseda magnetofono
- Kasedujo
- Diskujo

ORION TV RADIO

Orion Rádió és Vill. Vállalat

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÁV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.

11. dec. 1982.